Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Marto - Aprilo 2016 | n-ro 03–04 (1329-1330)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA







La 26an de Marto,
E-mondo perdis gravulon,
mi, gravan amikon.
Serĝo.

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Ili havas armilojn, sed ni florojn...



**Intervjuo post la teroratencoj en Parizo**

**Raportisto**: Ĉu vi komprenas, kio okazis, kial tiuj homoj faris tion?
**Knabo**: Ili vere estas tre tre malicaj homoj. Ni devas esti memgardemaj, ĉar ni devos transloĝiĝi el nia domo.
**Patro**: Ne timu, ni ne devos transloĝiĝi. Francio estas nia hejmo.
**Knabo**: Sed ili havas armilojn. Ili povas pafi nin, ĉar ili estas malicaj.
**Patro**: Eble ili havas armilojn. Sed ni havas florojn. Rigardu la homojn, ili demetas florojn, per ili ili batalas kontraŭ armiloj.
**Knabo**: Ili gardas nin per floroj, ĉu?
**Patro**: Precize tiel.
**Raportisto**: Ĉu vi nun fartas pli bone?
**Knabo**: Jes, mi fartas pli bone.

*Esperantigis Cezar*

Ne nur per PIV li edukis...

**Michel Duc-Goninaz** estos rememorata unuavice kiel ĉef-redaktanto de la Nova PIV, eldonita en 2002 kaj represita kun malgravaj ŝanĝoj en 2005. Ĝi ja estis grava rebakaĵo de la verko, kiun Varingjeno publikigis jardekojn pli frue, en 1970, kun suplemento en 1987.

Tamen, lia rilato al SAT ne limiĝis al tio. Jam en la 50-aj jaroj, li kontaktis kun tiamaj parizregionaj SAT-anoj en la kabaredo de la "Tri koboldoj", kaj kutimis vespermanĝi interalie kun Varingjeno kaj Lucien Laurat. Meze de la 60-aj jaroj, li ankaŭ persone amikiĝis kun Georgo Lagranĝ' kadre de laboro por Franca Esperanto-Instituto (FEI).

Kvankam li kunlaboris al SAT-organoj jam tiutempe, li dum jaroj detenis sin de aliĝo, pro nekonsento pri la statuta malpermeso al PK-anoj membri en UEA. En 1977, post nuligo de tiu ĉi malpermeso, li membriĝis sub matrikulo 32511. Li partoprenis per artikolverkado, adaptis la teatraĵon "La Ŝtona Gasto" laŭ Puŝkino en formato ludebla en Esperanto-medio (SAT-broŝurservo, 1984), kaj tradukis la romanon "La Fremdulo" de Albert Camus (SAT, 1993). Li plie kontribuis al la praktika funkciado de la asocio, prezidante laborkunsidon en Odeso (1998), partoprenante proponkomisionon en Alikanto (2002), kaj membrante en la Ĝenerala Konsilantaro por la mandatperiodo 2003-2006. Li ne plu renovigis sian kotizon ekde 2006, sed restis en rilato kun SAT pri la plua ĝisdatigo de PIV kaj pri pretigo de renovigita Plena Vortaro. Krome li tradukis la poemon "La liberigantoj" el la "Kanto Ĝenerala" de Pablo Neruda (SAT-EFK, 2010), kaj verkis antaŭparolon al "Varma Mezepoko" de Serĝo Sir' (SAT-EFK, 2014).

# El tio, nia peĉo

Jen vi, el la rubujoj viastrataj,
ŝarĝita per manĝaĵoj rehejmiĝas:
tri picoj, krom rostita kokidaĵo,
paro da kartonbrikoj da lakt' iom acida,
ses piroj en siropo
kaj du tomatoj ŝimaj...
Jen trezoro.

Vi manĝas unu picon kun kokidaĵo frida:
mankas elektro, gaso... Ĉi servojn interrompis
mastraro rabobirda,
ĉar vi ne pagis.
Ba!

Tio ĉe filmoj estas plej kutima.
Nu, tio manĝi frida l' kokidaĵon.
Jen kutim' distingita.
Tio pri l' gas', elektro, via senlaboreco,
estas fiaĵoj, kiujn la ŝtato ne evitas.
Vin ne iritas ĉi ideo. Poste
eliras vi vagadi en la urbo trankvila.
Sata kaj netuŝata! Amaso tumultema
"aliĝu, ne rigardu nin" alkrias.
Vi ne komprenas, kial nek por kio
vi devus do aliĝi al homoj tiel spitaj.

El tio, nia peĉo!, murmuras vi. Forvelas
ignorante, ke iam
vi perdis ion multe pli gravan ol elektro,
gaso, akvo, laboro... rideto ĝoj-esprima.
Vi perdis vian dignon,
esencan parton de la vivo nia.

Miguel Fernández

## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

"Ili havas armilojn, sed ni florojn." En la plej nigraj momentoj de la homa historio, ĉiam ekzistis klopodoj kontraŭstarigi fratiĝon al barbareco, kiel pruvis, eĉ se nur mallongtempe, kelkaj soldatoj dum la unua mondmilito. Ofte malfacila estas la tasko. La du artikoloj ĉirkaŭ la situacio en Israelo atentigas, ke ankaŭ en niaj vicoj kolizias foje plej kontraŭdiraj starpunktoj. Certe ili vekos pliajn reagojn.

Ĉi-foje estas traktitaj ne nur okazaĵoj el Mezoriento, sed ankaŭ el aliaj kontinentoj. Aparte bonvenaj estas la kontribuoj pri Latvio, eta lando el kiu malofte venas informoj. Salutinda estas ankaŭ la reapero de rubriko pri tutmondaj sindikataj novaĵoj, kaj la invito el la leterkesto al debato pri laborista memmastrumado.

Certe multajn pliajn temojn vi ŝatus vidi traktitaj en Sennaciulo. Do, ek al fotado, desegnado, aŭ artikolverkado! Pensu ke viaj kontribuoj ankaŭ povas esti bazo por kongresaj diskutoj, eĉ se vi ne povos fizike ĉeesti mem. Kaj kompreneble, novuloj ĉiam estas bonvenaj por pliefikigi la laboron de

La Redaktoskipo

## Venontaj limdatoj

Venontaj limdatoj

Sennacieca Revuo 2017: 31a de decembro 2016

Sennaciulo 7-8 (1333-1334): 20a de majo

Sennaciulo 9-10 (1335-1336): 20a de julio

# Enhavo

Enhavo


2 Ili havas armilojn, sed ni florojn... CEZAR
El tio, nia peĉo MIGUEL FERNÁNDEZ
Pri Michel DUC-GONINAZ VINKO MARKOV

### Fratiĝo iama - militoj nunaj
4 La Monumento de la fratiĝoj TERANO
5 Senfina historio, nova ĉapitro LIZAS WELT
6 Zamenhof pravis (2) ROGER CONDON

### De Eŭropo al Latinameriko
10 Alia lando SERGEJ TIŜĈENKO
Mitingo por la sociala justeco LATVIA SOCIALISTA PARTIO
11 La "identecanoj" KURT LHOTZKY
12 Atestaĵoj el Venezuelo ROLAND PLATTEAU
13 Tiom dezirata "Demokrata transiro en Kubo" PASCUAL SERRANO

### Sindikatismo tutmonda
14 Venu al Toronto... DEREK BLACKADDER KAJ ERIC LEE
Ĝibutio : sindikatisma instruisto enkarcerigita
15 Sud-Koreio : Ĉesigu la subpremon kontraŭ sindikatismo

### Filologio
15 Kio estas kulturo ĜEMIL KSUS

### Intelekta memdefendo
18 Enigmoj DIANA RIŜAR
Solvo de Serĝo
19 Pri diversaj kredofobioj ĜEMIL

### Naturscienco
20 CARMENES DAVID GALADÍ

### SAT-anoj aktivas
21 Librotago en Vieno KURT LHOTZKY
Finfine "Bohemiaj lumoj" vidis la lumon MIGUEL FERNÁNDEZ

### Sennaciisma frakcio
22 Pri sennaciismo en universitata revuo PEDRO SANZ

### El la leterkesto
23 Letero al eks-jugoslavaj kamaradoj GERRY PHELAN

### Recenzejo
24 La korto ANNE JAUSIONS

### Tra Esperantio
25 Labori por paco en malpaca mondo MARK FETTES

### El la SAT-administrejo
23 Aliĝintoj al SAT-Kongreso en Hercbergo
26 Kotiztabelo | donacoj | perantoj
27 Novaj aliĝoj | Nekrologoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:* ***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***

# La Monumento de la fratiĝoj

## Historio

**Tabua temo, longatempe nekonata de popolamaso, fratiĝoj dum milito 1914-18 estas eventoj por scii kaj sciigi. Monumento omaĝanta ĉi tiujn soldatojn ĵus inaŭguris en Neuville-Saint-Vaast, urbeto de la departemento Kaleza Markolo, Norda Francio.**

Imagu vi scenon. Viroj elvenantaj el Francio, el Germanio kaj el Britio renkontiĝas kaj interŝanĝas tabakon, vinon kaj ĉokoladon. Ili montras la fotojn de siaj edzinoj kaj gefiloj. Ili kantas kune kaj eĉ, iam, decidas futbali kune. Tio estas tre simpatia sed, vi diros al mi, neniel escepta. Krom ke ni estas precize dum la unua mondmilito, en batalkampo, inter tranĉeoj, inter pikildratoj, inter mortoj. Ĉi tiujn nekredeblajn eventojn, oni nomas *la fratiĝoj*.

## Tabua temo


Daŭre hodiaŭ, ĉi tiu temo restas tabua. Ĝi ĝenas militestablojn, kiuj faris ĉion eblan por ke tiuj ribelagoj, rigardataj kiel kontraŭpatriotaj kaj kiel kondamnindaj pro konsento kun malamiko kaj pro ŝtatperfido, estu silentigataj, forigataj. Longatempe ĝi ĝenis ankaŭ, kaj daŭre iel ĝenas, ŝtatestablojn kaj iliajn reprezentantojn, kiuj ebligis ĉi tiun buĉadon per, interalie, propagando dum pluraj jaroj, kiu akrigis nacisenton kaj kiu preparis spiritojn por militi, celante disponi amason da homoj pretaj sin oferi kiam ili deziros. Ĉi tiu sama nacisento kiu forte revenas hodiaŭ celante satigi aliajn projektojn, dum aliaj cirkonstancoj. Tamen, se Historio havas utilecon, ĝi estas analizi estintecon por kompreni estantecon kaj ne refari samerarojn dum estonteco, ĉu ne? Jes, fratiĝoj dum la unua mondmilito estas gravaj eventoj sciindaj kaj studindaj. Ili samtempe reliefigas tion, kio estas plej alta, kaj tion, kio estas plej malalta en la homaro. Do, mi neniam sufiĉe dankos Christian Carion.



Futbalmatĉo dum kristnasko 1914

## Feliĉan Kristnaskon

Antaŭ ĉio, ĉar li estas enscenigisto de ĉi tiu belega filmo, *Joyeux Noël* (*Feliĉan Kristnaskon*), kiu elstare temas pri fratiĝoj dum unua mondmilito. Ĉio estas ene! Ekde la komenco de la filmo, oni vidas malbonajn agojn de la ŝtatpropagando en lernejo kie oni instruas al la francaj knaboj abomeni germanulojn, al la germanaj knaboj abomeni britulojn kaj al la britaj knaboj abomeni germanulojn. Poste, oni vidas, evidente, ĉiujn kuraĝajn agadojn de fratiĝoj, de la plej malgrandan ĝis la




Filmafiŝo

plej eksterordinaran, kaj ankaŭ hontindajn religiparoladojn kaj la miskonigojn de la militaltranguloj. Ĉio estas vera! La enscenigisto simple permesas al si, por la filmkohereco, kunigi samloke ĉiujn eventojn kiuj okazis en la malsamaj lokoj en fronto. Nur ĉeesto de soprana kantistino kun soldatoj estas pura fikcio. Unufraze, ĉio estas tie por malamikigi multe da personoj. Kaj obstakloj, kiujn mi ne detalos ĉi tie, estis multnombraj, fakte. Sed Christian Carion rezistadis kaj la fimo ekmontriĝis en 2005. Tiel, ĉi tiu temo, tiam unike sciita de malmultaj historistoj kaj pasiuloj de ĉi tiu periodo, riveliĝis por ĉiuj. Gratulon! Sed multaj aliaj obstakloj atendis lin ankoraŭ, ĉar ĝia projekto ne haltis tiam.

## La Monumento de la fratiĝoj

Dum siaj esploradoj, Christian Carion malkovras fakte kajerojn de Louis Barthas, barelisto el Sudfrancio, partopreninta en konflikto dum la kvar jaroj. Ili enhavas siajn soldatĉiutagajn kaj travivitajn eventojn, interalie scenojn de fratiĝoj proksime de la urbeto Neuville-Saint-Vaast. Profunde



**Christian Carion antaŭ la Monumento de la fratiĝoj**

kortuŝita de tio kion li ekspertis, li skribris:

Iam eble, en ĉi tiu Arteza angulo, oni starigos monumenton por memorfesti ĉi tiun fratec-elanon inter viroj kiuj havis abomenon de la milito kaj al kiuj oni trudis reciproke sin buĉi malgraŭ iliaj deziroj.

Ekde tiam, la ideo pri konkretigado de la deziresprimo de la barelisto neniam forlasis la menson de la enscenigisto. Sed kiom da afliktoj antaŭ sukcesi! Dek jaroj estos necesaj por ĝisfine regi ĉi tiun projekton. Inaŭgurita la 17an de decembro 2015 (do cent jarojn post eventoj), en la ĉeesto de François Hollande, Prezidento de la Franca Respubliko, la Monumento de la fratiĝoj estas ekde nun unika konstruaĵo en la mondo memorfestanta pacagojn okazintajn dum milito. Libervole diskreta kaj simpla, kiel fratiĝoj, mi invitas vin viziti ĝin se vi pasas tra la regiono. Tiamaniere vi bele omaĝos al ĉi tiuj kuraĝaj soldatoj.

## La graveco de la lingvo por fratiĝi

Ĉeestinta dum la inaŭguro, mi estas mirigita de montriĝema bedaŭro de iom da parolantoj pri manko de sama lingvo, reakiranta per rekta aŭ malrekta maniero el dirojn de Louis Barthas skribitaj en liaj kajeroj: "Se almenaŭ ni parolus saman lingvon!". Ĉi tio ankaŭ memorigas min pri rimarko de la historiistino Coralie Jacquot dum prelego organizita de mia asocio pri fratiĝoj dum la una mondmilito (www.epam-tv.com/histoire/fraternisations) sciiganta ke ĉi tiuj pacagoj sukcesis unike tie kie almenaŭ individuo inter ĉeestantoj parolis lingvon de alia individuo. Kiun lecionon dedukti rilate al hodiaŭ? Nuntempe, kiam reveno de landlimoj tute malpermesos respondi al defioj, kiuj atendas nin (mi ĉefe pensas pri terorismo kaj ekologio), ĉu ni ne bezonus neŭtralan kaj justan lingvon celante nin kompreni, pli bone nin koni, kunlabori kaj fratiĝi? Evidente jes! Sed kiu malpermesas tion? Ankoraŭ kaj ĉiam nacio, ĉi tiu fikcio pleje diskonata en la mondo kun Dio, nesuperebla horizonto de niaj mallarĝmensoj. Tio, kion ni bezonas hodiaŭ, ne estas pli da muroj, pli da flagoj kaj pli da ŝtathimnoj. Anstataŭ malantaŭen, ek antaŭen! Por tio, universala kaj ne nacia lingvo estos necesa. Kaj ĉi tiu lingvo ekzistas, ĝi sin nomas Esperanto. Kiel ankoraŭ faras milionoj da individuoj tra la mondo malgraŭ malestimo, mokoj kaj totala manko de apogo, ni ĝin utiligu celante konstrui pli fratecan mondon. Ĉar kiel diris nia konceptisto, Doktoro Zamenhof, dum la una Universala Kongreso de Esperanto ĉe Boulogne-sur-Mer, en la sama departemento kiel Neuville-Saint-Vaast, kun ĉi tiu lingvo ne estas francoj kun angloj kiuj kunvenos, nek rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj.

Terano

# Senfina historio, nova ĉapitro

La historio tiel senfina kiel ege senfama kun la titolo "Unuiĝintaj Nacioj kontraŭ Israelo" estas pliampleksigita per plua ĉapitro. Post kiam *Rima Ĥalaf* [1], la gvidanto de la Ekonomia kaj Socia Komisiono de UN por Okcidentazio (ESCWA), ankoraŭfoje distingiĝis per severe kontraŭisraelaj eldiroj, la ambasadoro de Israelo ĉe UN, *Ron Prosor*, turnis sin al la Ofico por Internaj Kontrolservoj de UN (OIOS). Prosor petis al ĝia ĉefo *Carmen Lapointe*, komenci ekzamenadon kontraŭ Ĥalaf. En letero al Lapointe la israela diplomato skribis laŭ la novaĵagentejo AP [2]: "Sinjorino Ĥalaf misuzis sian postenon por agendo kontraŭ Israelo kaj tiel difektis la devojn kaj principojn de UN." Konsekvence devus urĝe komenci juĝenketoj kontraŭ ŝi.

La Ekonomia kaj Socia Komisiono por Okcidentazio estas unu el la kvin regionaj komisionoj de la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN (ECOSOC), kiu siavice estas unu el la ses ĉeforganoj de UN. La ĉeftasko de la ESCWA, kiu lokiĝas en Bejruto, estas la subteno kaj evoluigo de ĝiaj 17 membroŝtatoj en la socia kaj ekonomia sektoro. La jordanianino Rima Ĥalaf gvidas tiun ĉi instituton de kvin jaroj kaj jam plurfoje atakis Israelon per akraj vortoj. Ŝi ekzemple diris en februaro de 2014 dum parolado [3], ke per sia memkompreno esti juda ŝtato Israelo difektas "la rajtojn kaj de la muzulmana kaj de la kristana praloĝantaroj" kaj sekvas "la koncepton de etna kaj religia pureco", kiu "en la 20a jarcento kaŭzis neaŭditan homan suferon". Per tio ŝi aludas, per diplomataj klaŭzoj, la holokaŭston kaj fakte riproĉis al Israelo, nun mem direktiĝi al tia homara krimo.

Ron Prosor jam tiam turnis sin al la ĝenerala sekretario de UN *Ban Ki-Moon* kaj petis al li maldungi Ĥalaf. Estas "neakcepteble, ke oni daŭre voĉas sub la flago de la Unuiĝintaj Nacioj kaj per misuzo de UN-aj laboriloj incitantaj kontraŭisraelajn eldirojn", li skribis [4] siatempe al Ban. Anstataŭ helpi la pacon kaj la evoluon de la arabaj ŝtatoj en la ekonomia sektoro, Rima Ĥalaf antaŭenigas "per



**Rima ĤALAF, gvidanto de la Ekonomia kaj Socia Komisiono de la Unuiĝinta Nacioj por Okcidentazio (ESCWA), dum parolado en Londono en la jaro 2011**

la demonigo de Israelo sian propran agendon", aldonis Prosor. Kaj tio estis nekomprenebla. Ĥalaf tamen rajtis resti en sia ofico, ĉar Ban Ki-Moon flankenlasis ion entrepreni kontraŭ ŝi.

Nun denove atakis la gvidanto de ESCWA Israelon. Ŝi prenis la partion de la "Gazao-floteto", per kiu la kontraŭisraelaj aktivuloj en junio provis rompi la maran blokadon, kiu laŭ la internacia juro estis permesata. Dum ŝi nomis la konvojon "legitima", ŝi komparis [5] la israelajn rimedojn por haltigi la ŝipojn kun "la violentaj forkondukoj de piratoj surmaraj, surteraj kaj aeraj, kiujn la mondo ne hezitas nomi terorismaj." Dum evento en la ĉefkomandejo de UN en Novjorko ŝi krome diris, ke la "internacia indiferenteco pri la israela okupado" kaŭzis "erozion de la fido en la monda justeco" kaj igis "kelkajn homojn preni la juron en siajn proprajn manojn". Kion oni kondamnadas kiel terorismon estis nenio alia ol "milito por justeco".

Tiuj ĉi novaj terur-aĵoj igis nun Ron Prosor alvoki la Oficon por Internaj Kontrolservoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj instigi ĝian gvidanton Carmen Lapointe juĝe ekesplori kontraŭ Rima Ĥalaf. "La eldiroj de Ĥalaf gutadas pro antisemitismo, kaj estas neakcepteble, ke gvidanta figuro de UN povas elparoli tiajn vortojn kun la subteno de la Unuiĝintaj Nacioj", skribis Prosor al Lapointe. Ĉu la UN-a "gardohundo" vere aktivos kaj Ĥalaf finfine estos liberigita de siaj taskoj tamen estas skribite en la steloj. Ĉar la kontraŭisraelaj eldiroj de la jordaniano ne estas apartaĵo, sed pli ĝuste tipaj kaj karakterizaj por UN. Rilate al la konduto pri la juda ŝtato la fiŝo malodoras de la kapo, kaj tio jam delonge [6].

Lizas Welt

*Tradukita de Dominik Schramm*

*Originala versio:*

*"Unendliche Geschichte, neues Kapitel"*

*http://lizaswelt.net/2015/08/27/unendliche-geschichte-neues-kapitel*

[1] Angle kaj internacie: Rima Khalaf

[2] http://hosted.ap.org/dynamic/stories/U/UN_UNITED_NATIONS_ISRAEL?SITE=AP&SECTION=HOME&TEMPLATE=DEFAULT

[3] http://www.jpost.com/Jewish-World/Jewish-News/Prosor-calls-for-UN-to-remove-official-for-anti-semitic-remark-348610

[4] http://www.algemeiner.com/2014/04/17/jewish-group-urges-removal-of-un-under-secretary-general-rima-khalaf

[5] http://www.israelnationalnews.com/News/News.aspx/199548

[6] http://lizaswelt.net/2015/03/25/vom-elend-der-vereinten-nationen

# Zamenhof pravis (2)

## Analizo de la cionisma efekto

Kvankam, pro la premo de lobiistaj movadoj, kiuj klopodas silentigi nin, ni timas tion, kion ni devos diri, kiel ano de esperantistaj asocioj neŭtralaj kaj sendependaj, mi pensas, ke ni devas pli antaŭeniri... Ni estas devigataj alfronti la realon de la mondo en kiu ni vivas, sendepende ĉu tiu realo estos bona aŭ malbona.

Celante preventi eraron kaj certigi min, ke mi perfekte laŭiras la bonan vojon, mi proponas, ke en la unua tempo ni demandu al fakuloj, ke ili dividu kun ni siajn spertojn kaj memorojn pri la eventoj okazintaj kaj okazantaj sekve al la amasa alveno de kolonianoj en Palestino:

Benjamin Harrison Freedman, usona industriisto, kiu estis fama ekscionisto, anoncis en sia parolado de la hotelo Willard la 6an de januaro 1961:

"... La judoj devenantaj de Orienta Eŭropo, pli konataj kiel aŝkenazaj judoj kaj reprezentantaj pli ol 96 procentoj de la hodiaŭa juda populacio, estas el ĥazara origino... Tiuj ĥazaroj, tiuj paganoj, tiuj azianoj, tiuj turk-ugroj estis mongoloida raso. Ili estis forpelitaj de Azio al Orienta Eŭropo. Ilia reĝo estante adoptinta la talmudan fidon, ili simple konvertiĝis al judismo inter 620 kaj 740, kaj havas



absolute nenian rilaton al la izraelidoj de la Biblio aŭ al iu ajn rakonto el la Biblio aŭ pri la Sankta Lando...” (Tiu versio estis adoptita kaj konfirmita de H.G. Wells, Arthur Koestler, Shlomo Sand, ktp.)

“... Israelo estas la sola lando en la mondo, kiu ne estas regata per ia skribita konstitucio aŭ iu ajn alia apriora kaj imanenta kodo specifa al jura ŝato, sed per rasismaj leĝoj privilegiantaj etnecon. Ĝi estas ankaŭ ia lando, kiu ne havas oficialan limon, sed ŝanĝiĝeman landlimon kaj kun ekspansiema geometrio. Tio devigas nin noti, ke Israelo estas nenio pli ol la plej granda armea bazo en la mondo...”

De Gaulle en sia konferenco de la 27a de novembro 1967 “*Le conflit Israël- Palestine analysé par Charles de Gaulle*” [1] diris:

“... Okaze de la franca-angla ekspedicio al Suezo, la israela ŝtato sin montris militema kaj firme decidita atingi pligrandiĝon... La Akaba-afero malfeliĉe kreita de Egiptio, tuj donos pretekston, al tiuj, kiuj revis batali... Israelo ekatakis kaj en la daŭro de ses bataltagoj forprenis la celitajn objektivojn. Nun ĝi organizas sur la kaptitaj teritorioj okupacion, kiu ne povas esti sen opreso, subpremo, elpelo kaj, se rezisto manifestiĝas, je sia vico Israelo nomos ĝin terorismo...”

## Respondecoj en la 1a mondmilito

Benjamin H. Freedman, kiu intime konis multajn prezidentojn kaj frekventis multajn aliajn same kiel multajn influajn politikistojn, parolas pri tiu temo en sia libro “*The hidden tyranny*”. Jen tio, kion li sciigas:

“... Ne malpli ol sep prezidentoj de Usono havis kun la cionismaj movadoj kulpajn rilatojn, kiuj povas esti nomataj altaj perfidoj kontraŭ Usono. Responde al la volo de cionistoj, ili oferis milojn da homoj en ĉiuj militaj operacioj.”

Dum la unua mondmilito, Usono


Daily Express
FRIDAY, MARCH 24, 1933. ONE PENNY.
JUDEA DECLARES WAR ON GERMANY
*Jews Of All The World Unite In Action*
BOYCOTT OF GERMAN GOODS
MASS DEMONSTRATIONS IN MANY DISTRICTS
DRAMATIC ACTION
HIGHER WAGES FOR STEEL WORKERS
AN INCREASE OF THREE SHILLINGS A WEEK
New “Sweep” Bill In The Dail
MR. DE VALERA AND STATE CONTROL
SECRET MEASURE
MR. MacDONALD EXPLAINS HIS TOUR
“PEACE CAN BE KEPT IN EUROPE”
LATE NEWS
OFFICER'S DAYS OF LOVE
CUTS THAT KILL

havis 115 516 soldatojn mortigitajn kaj 202 000 vunditajn. Kaj, pro kiu celo? Ĉar la aliancanoj, ĉefe Anglio estis perdantaj la militon kontraŭ Germanio. En oktobro 1916, la cionistoj tiam proponis al la “British War Cabinet” interkonsenton. Ili proponis puŝi Usonon eniri la militon por dispremi Germanion kaj, kompense, Britio promesis doni al ili regadon super Palestino. Tiu interkonsento, konata sub la nomo de “Balfour-Deklaro”, estis subskribata kaj tiel efektivigata la 2an de novembro 1917.

Tiel, kvankam tio neniam devus okazi, la 6an de aprilo 1917, por pravigi la ekmiliton de Usono kontraŭ Germanio, prezidanto Wilson — kiun ĉantaĝigis la novjorka advokato Samuel Untermeyer kaj la juĝisto Brandeis, ambaŭ konataj kiel eminentaj cionistoj — kredigis, ke germana submarŝipo sinkigis la ŝipon Sussex kaj mortigis la usonajn civitanojn, kiuj estis surŝipe.

Je la kapitulaco, la Traktato de Versajlo, postulita de la cionistoj, malfortigis Germanion dividante la landon en du partojn apartigitaj per longa terpeco, la koridoro de Dancigo. La humiligo suferita de Germanio estis kondukonta al naziismo kaj pretigis la terenon por la dua mondmilito.

## Kial Adolf Hitler decidas la eliminadon de judoj

Pelitaj de la rusaj pogromoj, en Germanio judoj estis trovantaj rifuĝejon kie ili povis eksterordinare bone prosperi plej kviete sub la protekto de la imperiestro. Sed ili perfidis sian protektanton — danke al la devaluto de la germana marko, ili aĉetis la plimulton de la landaj entreprenoj kontraŭ ridinde malaltaj monsumoj. Ili eniĝis en la financajn kaj provizajn merkatojn kaj kontrolis la gazetaron. — Tiam komprenante, ke ili tuj perdos sian escepte privilegiitan situacion, ili minacis Germanion de reprezalio kaj postulis la forpelon de Adolf Hitler nomumita kanceliero de la prezidanto Hindenburg, je la 30a de januaro 1933. Antaŭ la malakcepto de siaj petoj, ili organizis kun la apogo de Roosevelt bojkoton de la lando. Tio ĵetis Germanion en nepriskribeblan marasmon ... kaj provokis koleron de germanoj kontraŭ judoj!

La 25an de aŭgusto 1933, interkonsento, “la Haavara-Akordo”, okazis inter la nazioj kaj la Juda Agentejo. Ĝia celo estis ĉion pretigi, por ke judoj evakuu, kiel eble plej rapide, Germanion kie ili iĝis “persona non grata”. Ili rajtis foriri, sed lasante la plimulton de siaj posedaĵoj surloke. Tamen, kontraŭ la vendo al Palestino de la varoj fabrikitaj en Germanio, sed blokitaj pro la juda bojkoto, migrantoj povis ricevi stipendion por ekloĝi en Palestino. Danke al tiu konsento, 50 000 judoj povis elmigri antaŭ ol la limoj estis fermitaj en 1940.

La novjorka ĵurnalo “*Jewish Daily Bulletin*” publikigis en siaj paĝoj de la 30a de oktobro 1934 intervjuon kun s-ro Richard Kunze:

“... La nova Germanio persistas en sia deziro forigi la judojn, kiuj responsas pri la situacio en la lando...”

Dum la sekvantaj tagoj, la unuaj svastikoj estis pentritaj sur la fenestroj de la judaj magazenoj. En 1938, pola judo eniris en la germanan ambasadejon en Parizo kaj mortigis germanan civitanon. La linio estis transigita! Tio estis la subkonscie atendita signalo por oficiale komenci la ĉasadon kontraŭ judoj!

Retrospektive, oni povas emi demandi sin pro ĉiuj tiuj okazaĵoj, ĉu ne la judoj mem, per siaj kolerema konduto kaj ekstremaj troigoj, startigis la nazian maŝinon, kiu tuj decidos pri ilia ekstermado en la naziaj koncentrejoj?

## Respondecoj en la 2a mondmilito

Germanio kaj Pollando estis atingontaj amikan interkonsenton por denove ebligi liberan trafikon sur la koridoro de Dancigo, kiu dividis Germanion en du partojn. Cionistoj agis diskrete, por ke la afero fiasku. Tiel la 25an de aŭgusto 1939, Britio sekrete proponis armean asistadon al Pollando, kiu tiam metis finon al la traktadoj kun Germanio. Evidente Anglio ne plenumis siajn promesojn kaj atentis ne interveni, kiam kontraŭ la volo de Pollando, la germana armeo eniris en la malpermesitan koridoron. Estis la komenco de la dua mondmilito

postulata de cionistoj por renversi la nazian reĝimon, kiu ne plu volis protekti ilin.

La prezidanto de Usono, Franklin D. Roosevelt, estis sub la influo de cionismo. Ĉar li ne povis rekte eniri en militon, li decidis uzi artifikon: bloki la regulajn liveraĵojn de petrolo kaj ŝtalo al Japanio, kiujn la lando absolute bezonis por daŭrigi sian propran militon kontraŭ Ĉinio. Reprezalie Japanio lanĉis ekatakon kontraŭ la amerikan militŝiparon, kiu estis postenigita en Pearl Harbor.

En 1952, Charles C. Tansill, en sia libro "*Back Door to War" - La Roosevelt-a eksterlanda politiko, 1933-1941* [2], malkaŝis la ekziston de nerefuteblaj dokumentoj pruvantaj la rektan implikiĝon de Roosevelt en tiu sinistra afero, kiu servis kiel preteksto. Usono eliris fortigita de la milito, sed tiu partopreno kostis la vivojn de 418 000 civitanoj ĝiaj.

La ĵurnalisto kaj prezidanta kandidato, Patrick J. Buchanan konfirmas ĉi scenaron en sia libro el 1999 "*A Republic, Not an Empire*":

"... Kontraŭe al la kutime akceptita supozo, Usono ne bezonis batali en la dua mondmilito. La lando estis devigita partopreni en la konflikto kun la membroj de la Akso nur per la volo de Roosevelt por helpi Anglion kaj Rusion kontraŭ Hitler. Sen la usona implikiĝo en la batalado, ili estus komplete neniigitaj. Tio estus ŝparonta la malvarman militon al mondo kaj ne nur...."



**Patrick J. Buchanan**


## Usonaj implikiĝoj en la mond-konfliktojn

La cionistoj ne estas la solaj kulpuloj en la procezo, kiu kondukis Usonon engaĝiĝi en la 1a kaj 2a mondmilitoj kaj en la aliaj. Estis tro da mono disponebla! Kaj, kion ni ne faru por plenigi siajn poŝojn, kiam mono fluas kiel akvo en rivero? Usono nur bezonis iom da helpo kaj kelkajn komplicojn, kiuj je okazo povos, se ili ne estas sufiĉe singardemaj, fariĝi perfektaj kulpuloj. Sed ni ne devas nin trompi, tio ĉi ne absolvas la respondecon kaj la aĉajn farojn de Israelo, kiu inicas, reguligas kaj eĉ akompanas la konstruon de malstabiligaj mekanismoj, por tio uzante ĉiujn haveblajn rimedojn. Ne gravas la botelo, kondiĉe ke ili havu ebriecon ...

Pro la milito, industrio de la eŭropaj landoj kiel ekzemple Anglio kaj Francio ne plu povis provizi la aziajn merkatojn, kiuj pro tio transmetis siajn mendojn al usonaj kompanioj. Do, ĉar lia lando eltiris profiton de la konfliktoj sen esti devigata partopreni en ili, la usona prezidento alvokis sian neŭtralecon por resti sekura malantaŭ siaj landlimoj, malproksime de la batalkampoj.

Sed kial sin kontentigi kun parto, tiel granda kiel ĝi povas esti, kiam vi povas preni ĉion? Engaĝiĝante en la milito flanke de eŭropanoj, amerikanoj iĝis iliaj ekskluzivaj, se ne privilegiaj provizantoj kaj tiel ili ricevis mendojn produkti ekipaĵon por ĉiuj rekrutigitaj soldatoj. Krome, ili fabrikis kaj sendis al Rusio aviadilojn, trajnojn, Studebaker-kamionojn, ktp.

De ŝuldanto, Usono iĝis kreditoro de Eŭropo kaj koncentris la orajn rezervojn, kiuj antaŭe estis gardataj en la kofroj de la militantaj landoj. La dolaro estis fortigita. La novjorka borso superis tiun de Londono. La usona ekonomio, kiu estis ĉe rando de recesio en 1913 rapide trovis vojon al prospero. Fine, senlaboreco estis nur malnova memoraĵo ...





## Mono pli valoras ol alianco

Jen, Mario Sousa, en artikolo publikigita en majo 2007 [3], skribas:

"... Estas bone konata kaj pruvita, ke la mondo de financistoj havas nek moralon, nek etikon... Sed malmultaj homoj imagis, ke komerco kun la landoj, kontraŭ kiuj ili estos militantaj kiel la nazia Germanio, daŭrigos sian kreskon."

Historio de tiuj aferoj kaj ekonomiaj interkonsentoj estis ĉiam "sekreta ĉapitro" en pluraj landoj. Estas ĉiam la kazo, interalie, en Britio. Koncerne Usonon, tiuj sekretaj aferoj estis rivelitaj kun la publikigo de la libro de la usona verkisto Charles Higham "*Komerco kun Malamiko: raporto pri la nazia-amerika mono-intriĝo de 1933-1949*", publikigita en Novjorko en 1983.

La unua afero malkovrita de Higham estis, ke la 13an de decembro 1941, tio estas ses tagojn post la japana atako kontraŭ Pearl Harbor kaj kvar tagojn post la Hitler-a deklaro de milito kontraŭ Usono, la prezidanto Roosevelt subskribis dekreton, la "*Trading With the Enemy Act*", en kiu la aranĝoj certigante la daŭrigon de la komercaj rilatoj kun malamikoj estis oficiale rajtigitaj fare de la Ministro de Financoj. Estas skandalo, ke tio estu ebligita, pensis Higham. Sed la afero estis multe pli grava ol tio! Usonaj firmaoj transpasis ĉiujn eblajn limojn, kiuj estis oficiale rajtigitaj, kaj estigis grandajn sekretajn negocajn rilatojn kun la nazioj.



Israel Ŝahak

# Nuna situacio

Edward W. Said skribis en la antaŭparolo de la libro de Israel Ŝahak "*Juda historio - Juda religio*":

"... Israelo estas unika kazo en la mondo, se ni konsideras la ekskuzojn al ĝi malkontestataj: ĵurnalistoj ne vidas, aŭ ne skribas, kion ili scias esti vera pro timo, ke oni skribu iliajn nomojn sur nigra vortlisto, aŭ ĉar ili timas reprezaliojn. Politikaj, kulturaj kaj intelektaj gravuloj, precipe en Eŭropo kaj Usono, pene strebas laŭdi Israelon kaj pluvigi sur ilin avantaĝojn, kiujn neniu alia lando sur la tero konis, kvankam multaj el tiuj personoj estas konsciaj pri tiuj maljustaĵoj ..."

Israel Ŝahak naskiĝis la 28an de aprilo 1933 en Varsovio kaj estis postvivanto de la naziaj koncentrejoj. En "*Juda historio - Juda religio*" (libro, kiun ĉiu povas legi kun granda profito) li diris:

"... Laŭ mi, Israelo kiel juda ŝtato konsistigas danĝeron ne nur por si mem kaj siaj loĝantoj, sed ankaŭ por ĉiuj judoj kaj ĉiuj aliaj popoloj kaj ŝtatoj en la Proksima Oriento kaj en aliaj lokoj... Kaj tiu danĝero pliiĝos, dum ni daŭre plifortigos du tipojn de faktoroj agantaj en la sama direkto: la juda karaktero de Israelo kaj la evoluo de ĝia potenco, speciale de ĝia atombomba potenco. Aldone al ĉi tio estas alia maltrankviliga faktoro: la kresko de israela influo sur la en Usono regantaj rondoj..."

# Reguloj de la juda sistemo

Juda vivo estas organizata laŭ la reguloj kodigitaj en la Babilona Talmudo, ankaŭ konata kiel la kodo de Majmonido la "Miŝneh Torao" kaj en la "Gemarah" de Mezopotamio. Laŭ la tempo, lando, medio, situacioj kaj tradukoj, la libro estas presita en plena aŭ mallongigita versio, por ke ni vidu nur la deziratajn partojn de la judoj, malgraŭ tio sen fornei la rekomendojn faritajn nevideblaj al la profanoj.

La preterlasoj estis publikigitaj en Israelo en populara eldono, sub la titolo "Hesronot Shas". Mi citas kelkajn por ekzemplo:

- Ĉiu judo pasanta proksime judan tombejon devas diri benon, sed antaŭ la aliajn tombejojn, li devas malbeni la patrinojn de la mortintoj ...
- La ĝentiloj (nejudoj) estante laŭ la Halakhah nekuraceblaj mensoguloj, ilia atesto povas havi nenian valoron antaŭ rabena tribunalo.
- La judo, kiu intence mortigas nejudon estas kulpa nur pri peko kontraŭ la leĝoj de la Ĉielo, ne puninda de tribunalo.
- Se judo kuniĝas sekse kun nejudino, ĉu plenkreska aŭ ne ... kaj ke li intence seksumis kun ŝi, ŝi devas esti mortigita, kiel estu kun besto, ĉar pro ŝi, la judo sin metis en malbonan situacion. Judo, dume, devos esti skurĝita.
- Judoj estas homoj, nejudoj estas animaloj.

En Interreto eblas trovi malsamajn versiojn de la Talmudo [4].

# Okupado de Palestino

Yehuda Ŝaul, kiuj servis kiel komandanto en la israela armeo kaj estas kunfondinto kaj kundirektoro de "Rompi Silenton" skribis:



Yehuda Ŝaul

"... Tiu, kiu pensas, ke Israelo povas senfine kontroli la palestinanojn perforte estas blindulo. Kaj tiu, kiu ne sukcesas kompreni la rilaton ekzistantan inter la permanenta kontrolo kaj perforto kaj timo, kiu kaptis nin kaj disvastiĝis en niaj stratoj dum la lastaj semajnoj, povos konduki nin al pli serioza katastrofo ol tiu, kiun ni jam vivas ... Ni devas agnoski niajn malsukcesojn kaj peti al nia registaro, ke ĝi laboru por meti definitivan finon al la okupado de Palestino."

Ĉu homoj povas ĉiam resti indiferentaj fronte al la turmentoj de la aliaj? Homoj estas mortigitaj ĉe nia pordo kaj ni nenion faras krom aliloken rigardi, kvazaŭ tio vere ne estus okazanta. Tamen ne temas pri kino! Tio ne estas informadika ludo, sed nur la nuda vero. Urĝas! Ni devas vekiĝi!

**"Mondo estas danĝera ne nur pro krimuloj, sed ĉefe kaŭze de tiuj, kiuj scias, sed faras nenion" (Einstein)**

Roger Condon

[1] https://www.youtube.com/watch?v=sFy2lDpE12U

[2] Kindle formato ISBN-13: 978-1621571001

[3] http://www.mariosousa.se/quiavaitpayeetarmehitler.html

[4] Vidu ekzemple la jenajn adresojn:
- http://www.codeig.net/Pranaitisfr.pdf
- http://michelduchaine.com/2014/02/12/20-extraits-choquants-du-talmud-18-livre-saint-des-sionistes-disrael-ce-nest-pas-la-torah-des-vrais-juifs/
- http://books.google.fr/books/about/Le_Talmud_de_Babylone.html?id=WEsVAAAAYAAJ
- http://www.contre-info.com/talmud-un-best-of

# Alia lando

Verŝajne, mi vivas en alia Latvio. Sufiĉe regule diversaj homoj diras al mi: vi, maljunulo, ofte desegnas ĉion en la ĵurnalo en nigraj koloroj; ĉio ne estas tiom malĝoja. Sed tiaj ĉi homoj estas terure malmultaj. Mi permesos al mi konsenti kun tiaj ĉi optimistoj. Mi ankaŭ volas vivi en lando, kie ne estas streĉiteco en interrilatoj de homoj diversaj, kie infanoj havas perspektivon kaj plenaĝuloj havas stabilecon; kaj maljunaj homoj havas ekzist-garantion dum maljuneco. Mi volas skribi pri la suno kaj vento, pri naskiĝo de infanoj, pri malfermo de novaj firmaoj kaj produktadoj, pri tio, ke la landon alvenas multenombraj decaj gastoj, pri reala influo de nia potenca ŝtato al la mondaj procezoj, pri certeco je morgaŭa tago...

Ĉion ĉi mi tie ĉi ne vidas.

Mi vidas, ke al mi, je leĝa nivelo, oni komencas malpermesi paroli pri multaj aferoj. Ne estis tiel eĉ en USSR, kiun, interalie, nun estas malpermesite laŭdi eĉ en tiuj momentoj, kiuj estas pli ol indaj je tia ĉi laŭdo. Mi vidas, ke malgraŭ oficiala statistiko malpleniĝas ne nur vilaĝanaj bienetoj kaj vilaĝoj, sed ankaŭ urboj: antaŭ kelkaj tagoj al mi venis mia kolego el *Latgale* [NdT: tiel nomiĝas la orienta parto de Latvio], rakontis pri realaj kvantoj de tieaj loĝantoj, kaj mi teruriĝis... Kaj alia kolego dum unu populara interreta forumo tre trafe rimarkis: latviaj loĝantoj diferencas de rifuĝintoj de Sirio nur per tio, ke latvianoj sukcesas prepari valizojn.

Mi ne povas ne reveni al la temo pri USSR. Tiamaj gvidantoj promesis al ni helan estontecon, kiu, interalie, veninte vere evidentiĝis hela. Ruinigita pro la milito, la lando estis rekonstruita; homoj el terkabanoj kaj domaĉoj translokiĝis en bonkvalitajn domojn; estis laboro, kies kondiĉoj pliboniĝadis, samkiel la vivkondiĉoj kaj bonstato; estis feliĉo. Sed poste venis tiuj, kiuj volis ĉion kaj tuj. Ne ekzistis ebleco krei tiaĵon. Kaj ili decidis forpreni de tiuj, kiuj ne povis sin mem defendi. Kaj tio estis farita, kiam la dezirantoj forpreni venis al regado. Kaj tuj ekparolis, ke plue ne estos pli bone. Ili havas alian Latvion – en vilaoj kun altaj bariloj kun gardistaro, kaj en varmaj seĝoj de burokratio en Bruselo. Kaj tio ĉi daŭras dum ĉiuj lastaj 25 jaroj! Ili ankaŭ pordon al Granda Eŭropo malfermis nur por ke tien forveturu kiel gastlaboristoj la plej pasia parto de la loĝantaro, la junularo, kiu je plej rekta senco povis la regantojn levi sur forkegojn. Kaj por ke tion ne faru la restantoj, sur teritorion de la lando ili enigis eksterlandajn armeojn, forgesinte, ke kvankam sur bajonetoj sidi eblas, tamen ne longan tempon...

Foj-foje al mi ŝajnas, ke mi sonĝas doloran sonĝon kun koŝmaroj. Tiam al mi ŝajnas, ke iam mi vekiĝos, kaj en ĉielo denove estos suno, kaj denove



**Sergej Tiŝĉenko**

aperos certeco pri morgaŭa tago, kaj kune kun mi estos miaj infanoj, kaj estos vivaj miaj karaj gepatroj kaj multaj el tiuj, kiujn ĉi jaroj finrompis, enigis en tombon. Kaj ne havos la potencon la bagatelemaj avaruloj, ne plu estos flamigantoj de ĉiuspecaj malkonkordoj. Tia estos alia Latvio – tute ne tia, pri kiu al mi rakontas la liberalaj optimistoj. Kaj por tia ŝanĝo estas homoj.

Nur, ili ankoraŭ devas vekiĝi.

Ĉar jam sonoras la horloĝo.

Sergej Tiŝĉenko

*– respondeca redaktoro de ĵurnalo Vesti Segodnja (Informoj hodiaŭ) – 04/11/2015.*

*El la rusa tradukis Andris Natinŝ.*

*Originala artikolo: http://vesti.lv/news/drugaya-latviya*

# Mitingo por la sociala justeco

## Agitfolio

Laboruloj de Latvio! Ĉu vi opinias justa la pagon por via laboro? Ĉu vi konsentas, kiel la registaro uzadas la impostojn, kiujn ĝi devigas vin pagi? Ĉu viaj enspezoj permesas al vi ne nur ĝisvivi, sed ankaŭ inde vivi? Ĉu estas al vi akireblaj medicinaj helpoj? Ĉu vi estas certaj, ke malriĉeco ne devigos vin serĉi pli bonan vivon eksterlande? Eldiru viajn postulojn dum la mitingo de Socialista Partio de Latvio.

**Regadon al laboro, sed ne al kapitalo!**

*Latvia Socialista Partio*

*www.latsocpartija.lv*

# Deklaro de la mitingo "Por sociala justeco" (07-11-2015)

Ni, kolektiĝintaj en tiu ĉi mitingo, opinias la socialan politikon de Latvia ŝtato absolute malkontentiga, kaj ni postulas:

1. **Taksi la socialan sferon kiel unuavica prioritato dum formado de buĝeto.** La ŝtato devas ekzisti por defendo de interesoj de ĉiuj ĝiaj loĝantoj, sed ne por granda transnacia kapitalo.
2. **Leĝe devigi la ŝtaton certigi indan vivonivelon al ĉiuj ĝiaj loĝantoj – per impostoj, kiuj estas kolektitaj de ili.** Aparte gravas restarigi la sistemon de kalkulado de vivnecesa minimumo – anstataŭ la absolute maladekvata koncepto "nivelo de minimuma enspezo", starigi tian minimuman laborsalajron kaj pension, kiuj ne estu pli malaltaj ol la vivnecesa minimumo.
3. **Ŝanĝi la rolon de la ŝtato en ekonomio. Dum la situacio, kiam formortas kompletaj regionoj, la ŝtato ne havas rajtojn esti gardanto de fremdaj privataj propraĵoj.** La ŝtato povas kaj ĝi devus ellabori programojn de progresado de regionoj kaj de progresado de ekonomiaj branĉoj; la ŝtato devas partopreni en produktado de bonaĵoj, la registaro devus esti formata laŭ principo de profesionalismo, sed ne laŭ principo de partia aparteno.

**Regadon al laborforto, sed ne al kapitalo!**

*Tradukita de Andris Natinŝ*

# La "identecanoj" [Identitäre] – maljuna faŝismo en juna vestoaro

De tri jaroj, Aŭstrio konfrontiĝas kun nova movado faŝista: La identecanoj. La movado identisma naskiĝis en Francio kaj prezentas sin kiel "patriotan" movadon por defendi la travivon de la "blanka raso" en Eŭropo.

En Aŭstrio, la plej dekstraj studentaj kolegaroj ("Burschenschafter"; *burŝenŝafto* = unuiĝo de dekstraj studentoj), kiuj ofte proksimas al la ideologio german-naciisma kaj naziisma, vidis novan ŝancon gajni "la mezon de la socio". Ili partoprenis en renkontiĝoj identismaj en Francio kaj fondis aŭstrian "franĉizon"* de la francia movado.

En kontrasto kun la tradiciaj grupetoj novfaŝistaj, la identecanoj uzas metodojn de la junulara kulturo: malpli da rekta perforta agado, sed provokajn agadojn. Ekzemple, kiam en 2013 rifuĝantoj okupis la Votiv-preĝejon en Vieno por protesti kontraŭ deportadoj de azilpetantoj, identecanoj same okupis la preĝejon en la rolo de fiktivaj persekutataj aŭstroj, kiuj iĝis "fremduloj en sia propra lando".

Sed en la ĉirkaŭo de aktivuloj identecanoj oni ĉiam trovas perfortajn novnaziojn, razkapulojn kaj huliganojn.

Ĉi tio estas karakteriza por tiu movado: unu flanko de la medalo identecana estas intelekta, por allogi studentojn. Dua flanko estas agresema kaj minaca por allogi ĉifonproletajn individuojn.

Ni scias, ke estas diversaj formoj de faŝismo. La plej granda eraro de multaj maldekstruloj estas pensi nur pri naziismo, kiam ni parolas pri faŝismo. La ideologio de identecanoj estas miksaĵo de faŝismo italia (movado "Casa Pound"), francia (faŝismo katolika, tipo "Action française"), aŭstria (klerikal-faŝismo), sed sub la komando de spertaj kadruloj naziistaj. La tielnomata "dekstra popolismo" en multaj landoj fibriĝas en la direkto faŝisma. Kaj tiam estas la horo de "identecanoj" kaj aliaj "novdekstraj" tendencoj.

Kio estas la karakterizaĵoj de la faŝismo? La malamo al la laborista movado; la ideologio de "popol-komunumo" (la sango estas pli grava ol la klasoj), la rifuzo de la burĝa demokratio; la preteco "konkeri la stratojn" per perfortaj rimedoj. (La antisemitismo ne estas ĉiam rekonilo de la faŝismo. Tial, grupoj kiel la identecanoj "avertas" pri la "nova



**Fabian Rusnjak, meze, kun teleskopbastono, estas en la estraro de identecanoj**

islama antisemitismo" por fari la impreson, ke ili ne estas naziistoj).

Esprimo de la nova strategio por gajni malkontentulojn estas kaŝi kelkajn tradiciajn programpunktojn de la ekstremdekstro kiel la germanan naciismon. La samaj novnaziistoj, kiuj iam parolis pri la "denaske difekta aŭstra nacio", marŝas hodiaŭ sub la ruĝa-blanka-ruĝa aŭstra flago kaj nomas sin "patriotoj".

Hodiaŭ, la kontraŭislamismo anstataŭas la malnovan antisemitismon de grupoj faŝistaj. Sed la rimedoj kontraŭ la "malamiko" restas la samaj. Ekz. "nekonata farinto" ĵetis en Linz (Linc, Supra Aŭstrio) porkokapojn sur la konstruejon de moskeo, en Vieno okazis simila atako en la distrikto Simmering, kaj islamaj junulinoj kun vualoj estis agresitaj en la stratoj de la ĉefurbo. Iam, viktimoj kaj polico supozis rilaton inter malbonfaruloj kaj identecanoj.

Nur post la "ondo de rifuĝantoj" la identecanoj finfine povis mobilizi milojn da homoj pere de manifestacioj kontraŭ la "granda interŝanĝo", kio estas ilia nova batalvoko. La "granda interŝanĝo" estas, en la lingvo de identecanoj, la perfida plano de la regantoj, unuavice la "kulturmarksistoj" (saluton de Anders Breivik!), por "interŝanĝi" la sanajn blankajn kristanajn popolojn kontraŭ barbaraj malplivaloraj "brunuloj".

Malantaŭ tiuj manifestacioj, gvidantaj aktivuloj de la "pacemaj" kaj "lojalaj" identecanoj atakis per bastonoj kaj pugnobatiloj junajn kontraŭfaŝistojn.

La "pacema" lingvo de identecanoj estas nur kamuflaĵo. Ni devas senmaskigi tiun movadon por preventi la naskiĝon de danĝera kolektejo por agresemaj ksenofobiuloj kaj batemuloj.

Kurt Lhotzky

* noto de la redakcio: **franĉizo** estas notvorto en NPIV, sed ne kun tiu ĉi signifo. Ĉi tie temas pri jeno: "La nocio franĉizo (el la angla *franchise*, kiu mem venas el la franca *franchise*; libera) signifas negocan metodon, ĉe kiu la franĉizdonanto transdonas al franĉizakceptanto la regionan uzon de negoca koncepto." (el Vikipedio)

# Atestaĵoj el Venezuelo

**Kolektitaj far Pierre-Alain Vandewalle**

En 2016, kiam troviĝas en stato de minacatoj tiu brava provo de liberiĝo, kiu estis la Venezuelo de Hugo Chávez, kaj la "socialismo de l' 21a jarcento", jen, eble eĉ pli trafaj ol politika analizo, atestaĵoj de simplaj venezuelanoj, kiuj estis kolektitaj en 2003, tuj post la venko de la popolo kontraŭ la provoj de puĉo.

## 1

"Saluton al la amikoj de Latin-Ameriko, kiuj estas en Eŭropo, kaj al ĉiuj personoj, kiuj iam aŭdis pri Venezuelo.

Mi estas dommastrino kun malmulte da enspezoj, ĉar al homoj kiel mi, la intaj registaroj ĉiam forprenis la rajton je laboro, je edukado kaj je sano. Ekzemple, de multaj jaroj terkulturistoj ne povas kulturi grundojn siajn.

Mi estas indiano-devena, el popolo kiu estis humiligata, buĉata, seksperfortata, turmentata, kaj hodiaŭ ili (la opozicio al Chávez) volas rei la samon.

La nuna registaro redonis al ni rajtojn esprimi nian opinion, labori, partopreni, nin organizi kaj partigi.

Antaŭe ni la plej humilklasaj ne povis, eĉ se ni tion volis, alproksimiĝi al la pordoj de l' teatro Teresa Carreño, ĉar ni tie ne estis bonvenaj. Kaj ĉiukaze, ni neniam povis esprimi nian opinion. Dum multaj jaroj ni, la indianoj, viroj kaj virinoj, ne havis rajton je io ajn, ni vivadis en timo, kaŝitaj en la kamparoj. Hodiaŭ la Prezidento de nia Bolivara Respubliko de Venezuelo redonas al ni niajn rajtojn, skribitaj en tiu konstitucio unuafoje, kalkulas je ni.

Hodiaŭ ili deziras elpreni el ni tiun prezidenton balotelektitan de la popolo. La opozicio diras, ke ĝi konsistigas la plimulton. Sed do, kie ja estas la kamparanoj, la nigruloj, la mestizoj kaj la indianoj? Aŭ ili ne ekzistas (ni ne ekzistas) aŭ ili nin ne kalkulas. Tamen ni estas homaj estuloj tiel, kiel ili: pensas ni, suferas ni, ploras ni, ridas ni, suferas ni el la malsameco. La opozicio ne atentas nin ĉar ni ne havas la potencon, kiun havas generaloj, kapitanoj, koloneloj, FEDECAMARAS (venezuela organizo de la mastraro — NdT) kaj komercaj televidoj kiel RCTV, Venevision, Televen kaj Globovision.

Je la nomo de ĉiuj indiĝenoj kaj kampkulturistoj, mi petas al vi, bonvolu publikigi mian atestaĵon en Latin-Amerikon kaj en la ceteran mondon. Mia nomo estas Irma Ĉazoy. Mi naskiĝis en Aragŭa, Venezuelo.

## 2

Sinjoroj la sekvantuloj de la opozicio, mi diras "sekvantuloj de la opozicio", ĉar la veraj oponantoj al tiu granda ŝanĝado, kiun travivas nia lando, estas la grandaj potencoj personigitaj per tiuj personoj, kiuj estris nian landon dum pli ol 50 jaroj, kaj kiuj nun nomiĝas CTV, FEDECAMARAS, Demokrata Kunordigado, kaj preskaŭ ĉiuj komercaj amaskomunikiloj (se ne ĉiuj). Kiam ni diras, ke la nafton posedas la plena venezuelanaro, tio estas ĉar pere de la mono, kiun ĝi permesas lukri, povas nia registaro pagi, aŭ provi pagi, la ŝuldon de la intaj registaroj. Sed tiuj opoziciuloj volas ke ni ne repagu, ĉar tio plifortikigus la nunan nian registaron. Gesinjoroj, se ni plu iros kun la tradiciaj registaroj, maskitaj en ŝajno de demokratoj, ni alvenos ĝis la stato, ke edukado kaj sano (kiuj estas neforpreneblaj rajtoj de ĉiu homo) iĝos privatigitaj, kio signifas, ke ne plu ekzistos publikaj kuracaj centroj, nek gimnazioj, nek universitatoj PUBLIKAJ (al ĈIUJ ALIREBLAJ), interalie. Neeblas, ke oni forprenus de ni niajn riĉaĵojn, ekzemple la nafton; kaj ili ja volas ĝin forpreni; kaj plej serioza afero estas, ke ili estis tuj vendontaj ĝin al transnaciaj firmaoj, donante akciojn al la estruloj de PDVSA (la nacia entrepreno pri nafto) kaj al la mandatitoj de tiu opozicio (la oligarĥuloj, kiuj de ĉiam estris tiun ĉi landon).

Sinjoroj la aprobantoj de la opozicio, kiu vekiĝas, ne lasu vin kunpreniĝi en la mortigan ludon de tiu opozicio. Por la estonteco de nia lando, kiun konsistigas niaj infanoj. La nunaj opoziciuloj tute ne zorgas ĉu vi mortos, certigantaj ke ili povu posedi, profiti el siaj interesoj. La nuna opozicio estas malesperiĝanta, ĉar ĝi estas perdanta siajn privilegiojn, kaj ĝi konsciiĝas, ke Prezidento estas posteno, kiun ili ne povas atingi.

*Esperantigis Roland Platteau*
*Januaro 2003*

# Tiom dezirata "Demokratia transiro en Kubo"

**Kion alportos la laŭdira "fino" de la blokado kontraŭ Kubo? Ĉu bonon, ĉu insidan malbonon? Usonanoj ne estas naivaj idealistoj (male al tiaj, kiaj ili ŝatas sin prezenti); se ili rezignis la blokadon, tio estas, ĉar ili esperas faligi Kubon alimaniere!**

**Nu, eble estas la tempo rememori, iom humure, kion alportus al kubanoj la "demokratio".**

De jam jardekoj la oligopolo amaskomunikila ne ĉesas tondri, ke en Kubo estas diktaturo, ke la gazetistojn oni enkarcerigas po dekoj, ke ne okazas balotoj ... kaj do, ke necesas transiro al demokratio, kun balotoj, en kiuj sin prezentas multaj partioj kun eblo gajni – nu, du kiel en Usono estus sufiĉe, se ambaŭ proponus la saman ekonomian modelon – kun buntaj balotkampanjoj, en kiuj la egaj financaj kaj firmaaj imperioj povus *investi* je kandidatoj. Temus pri "demokratio" simila al la usona, en kiu ne riskus voĉdoni la nigruloj, nek la malriĉuloj. Kaj kompreneble ne rajtus voĉdoni la laboristoj el aliaj landoj, nur labori, pagi impostojn, kaj enkontrakti en la armeon. La "demokratia" Kubo estos bonokaze malmultekosta al la "demokratia" registaro: ne estos plu tiom da kostoj por la sano aŭ la edukado. Jes! Vidu ĝiajn najbarojn Honduraso aŭ Dominika Respubliko: ili estas landoj perfekte "demokratiaj", kiuj tre domaĝas tiajn multekostajn publikajn servojn, kiuj havas nenian rilaton kun demokratio!

Cetere, la civitanoj evitos multe da cerbumado: ili ne plu devos kolektiĝi, kiel ili faras sub la "diktaturo" kuba, en asembleoj komunumaj, provincaj, aŭ sindikataj, por elekti siajn reprezentantojn. Voĉdoni unufoje ĉiun kvaran jaron plene sufiĉos por demokratio. Certe, ili ne devos zorgi pri la efikeco de siaj registaroj meze de ties mandatoj per revokaj leĝaroj ilin pritaksantaj, kiel hodiaŭ okazas en la kuba "diktaturo".

Se Kubo forlasos la kruelan socialismon kaj fariĝos "demokratia", ĝi povos kondamni kaj ekzekuti homojn je mortpunoj ne mallaŭdate de Unuiĝintaj Nacioj, kiel okazas en Usono, (kiu eĉ permesas al si mortkondamni neplenkreskulojn, rifuzinte subskribi la Internacian Paktón pri Infanaj Rajtoj, kiu estus malpermesinta tion), kaj tio eblos, ĝis ĝi estos konstanta membro de la Konsilio de Sekureco. Ĝi rajtos ankaŭ starigi koncentrejojn por malliberuloj sen juĝisto aŭ advokato, kaj tion ie ajn en sia teritorio, ne nur, kiel okazas nun, en Guantanamo.

Avantaĝoj al kuba "demokratio" estos multaj. Ili estos bonvenigitaj en la batalo kontraŭ terorismo, kio implicas inter aliaj privilegioj tiun, ke ĝiaj firmaoj povos gajni profitodonajn kontraktojn cele rekonstrui la "malbonajn" landojn, kiujn ĝiaj bomboj estos antaŭe malkonstruintaj.

Pluse, Kubo ne plu havos malbonajn rilatojn kun la aliaj "demokratiaj" landoj; ĝi restarigos diplomatiajn rilatojn kun la registaro de Salvadoro, de la sama partio, kiu aranĝis la Skadrojn de Morto kaj kun Nikaragvo, kiu sukcesis ĉesigi la alfabetigan planon, kiun Sandinismo estis ekiginta. "Demokrata" kuba prezidanto povos post emeritiĝo komforte retiriĝi tiel, kiel siaj "demokrataj" kunuloj Pinochet en propra lando, Mobutu en Francio aŭ Marcos en Usono.



**Pascual Serrano**

Krome kaj krone, ĝi ne plu havos problemojn kun Eŭropunia "demokratio", en kies balotoj 30% de la civitanoj partoprenas.

Se Kubo elektos "reĝimon de libereco", ĝi rajtos malpermesi al la civitanoj viziti siajn familiojn, se tiuj vivas en lando socialisma. Se la kubanoj estus "demokratiaj" kaj egalaj antaŭ leĝo, ili ĝuus la malpermeson sendi ŝinkon aŭ sapon al siaj fratoj aŭ filoj, se tiuj anas la komunistan partion, tiel, kiel ĝuas jam la kubanoj sub "demokratio" en Miami.

La ununura afero, kiu ne kompreneblas, estas, ke antaŭ tiom da avantaĝoj la kubanoj obstinas ne deziri esti "demokrataj".

Pascual Serrano

*Originala teksto:*
*http://www.rebelion.org/noticia.php?id=1381*
*Esperantigis Roland Platteau*
*Julio 2004*

# Venu al Toronto por la konferenco "LabourStart Global Solidarity" – de la 6-a ĝis la 8-a de majo 2016

Bonvolu noti la daton! En 2016 LabourStart revenos al Kanado por sia konferenco pri tutmonda solidareco. La konferenco estos organizita partnerece kun la Konsilio de la Laboro de Toronto kaj la regiono de Jorko en la Universitato Ryerson de Toronto, de la 6-a ĝis la 9-a de majo 2016. La ĉefa lingvo de la konferenco estos la angla, sed la Organizkomitato plenumos ĉiajn eblajn strebojn por liveri tradukservojn laŭ la petoj.



LabourStart organizis sian unuan malferman konferencon en Hamilton, Kanado. Tiu estis tiel sukcesa, ke ni organizis konferencojn en Aŭstralio, Turkio kaj Germanio, kun pli kaj pli da sukceso. Ni esperas daŭrigi samtendence.

La organizkomitato, kiu reprezentas la ĉefajn sindikatojn, LabourStart-on kaj la Konsilion pri la Laboro de Toronto jam formiĝis kaj ni planas anonci programon komence de 2016.

Neniu promeso, sed tamen ŝajnas ke la ĉefa temo povus koncerni la migrantajn laboristojn. Aliĝkostoj estos petitaj, sed ni povos rezigni por la nepagipovaj personoj. La konferenco estos malfermita al ĉiuj; vi ne bezonas mandaton de via sindikato.

La organizkomitato estas kontaktebla ĉe Canada@LabourStart.org, se vi bezonas invitleteron por akiri enirvizon en Kanadon, aŭ se vi deziras helpi la konferencan disvolviĝon.

Por enskribiĝi:
http://www.labourstart.org/go/

Ni engaĝiĝas informi ĉiujn personojn, kiuj enskribiĝos, pri la antaŭenigo de la afero pere de ĝisdatigoj laŭ la progreso de la organizado.

Rendevuo en Toronto!

Derek Blackadder kaj Eric Lee

# Ĝibutio: sindikatisma instruisto enkarcerigita

Omar Ali Ewado, ĝenerala kunsekretario de Unuiĝo de la Instruistoj en Elementaj Lernejoj (SEP), kaj prezidanto de Ĝibutia Ligo pri Homaj Rajtoj (LDDH) estis arestita kaj kondamnita al tri monatoj da malliberigo post publikigo de listo de viktimoj post la masakro de civiluloj plenumita de la sekurecaj fortoj la 21an de decembro 2015 en la kvartalo Balbala en Ĝibutio. Estas neakcepteble, ke S-ro Ewado estu punita pro siaj legitimaj aktivaĵoj kiel defendanto de homaj rajtoj. Ni ankaŭ estas ege maltrankvilaj pro liaj malbonaj karceraj kondiĉoj. Krome, la advokato de S-ro Ewado estis retenita de la aŭtoritatoj en la flughaveno de Ĝibutio kaj konsekvence ne povis defendi sian klienton, kio estas nekontestebla malrespekto de la internaciaj normoj, koncerne rajton pri defendo. La apelacia proceso okazos sabaton, la 30an de januaro.

Ni petas de la aŭtoritatoj de Ĝibutio, ke ili garantiu justan apelacian proceson por S-ro Ewado kaj ĉesigu ĉiajn turmentadojn kontraŭ li kaj kontraŭ ĉiuj defendantoj de homaj rajtoj en Ĝibutio.

*Informo el LabourStart: http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=2945*




**Omar Ali Ewado**

# Sud-Koreio: Ĉesigu la subpremon kontraŭ sindikatismo

Ekde sia enpostenigo en 2013, la registaro de la prezidentino Park Guen-hye de Sud-Koreio plurfoje provis malfortigi la laboristajn rajtojn kaj iliajn sindikatojn, inkluzive per mobilizado de la polico, kiu fiaskigas manifestaciojn kaj arestas la sindikatajn gvidantojn. Plurfoje, la Internacia Organizaĵo de la Laboro (IOL) kondamnis la korean registaron pro ĝiaj gravaj malrespektoj de la rajtoj al asocia libereco kaj al kolektiva intertraktado. La 21an de novembro, la polico traserĉis la oficejojn de la Korea Konfederacio de la Sindikatoj (KTCU) kaj de ties filioj, kaj kaptis dokumentojn, materialojn kaj komputilojn. Pluraj dungitoj de la KCTU estis arestitaj kaj arest-ordono estis lanĉita kontraŭ la prezidanto de la KCTU, Han Sang-Gyun.

Tiu surprizatako sekvas partoprenon de la sindikatoj al kolektiĝo, la 14an de novembro, por protesti, interalie, kontraŭ serio de reformoj pri laborrajto, kiuj grave subfosas la rajtojn de la laboristoj kaj de ties sindikatoj. La reformo de la laboro antaŭenpuŝata de la registaro ebligus redukti pagon de la kromaj laborhoroj, de la feritagoj, dungi portempajn laboristojn en la baza manufaktura sektoro (ĝis hodiaŭ kontraŭleĝa) kaj malaltigus la nivelon de la senlabora monkompenso por la laboristoj dungitaj en mallongdaŭraj postenoj kaj malaltaj salajroj. Fine, la prezidentino Park elvokis la minacon de internacia terorismo por denunci la gvidantojn de la protestoj, kio sugestas ke la teroristoj povus profiti de la manifestacioj por lanĉi atakojn.

*Informo el LabourStart: http://www.labourstartcampaigns.net/show_campaign.cgi?c=2895*



**Han Sang-Gyun**



# Kio estas kulturo

Filologia alproksimiĝo

La demando estas vasta, ĝia respondo malfacila. La latina *colere* origine rilatas al "terkulturo". Ĝi havigas al ni tri notindajn radikojn, parencajn al la nura "kulturo", la tri ĉeestajn en Esperanto (inter aliaj latinidaj lingvoj):

- 1/ "kult-i", nome honori per kulto, per rito (ĉefe kulti tiun aŭ alian "Dion", ni ne forgesu la tiaman paganan kuntekston);

- 2/ "kultur-i", kio povas signifi ĉu prilabori teron [a] – tiusence eblas eĉ prilabori akvon per fiŝ-kulturo) –, ĉu flegi, eduki, klerigi [b];
- 3/ "kultiv-i", same kiel ĉi-supre, sed PIV ne konsilas la uzon laŭ la senco "2 [b]". Tamen, en sia Biblio, Zamenhof plurfoje uzas "kultivi" laŭ ĝia baza terkultura kompreno: "Kaj Noa komencis terkultivan laboron kaj plantis vinberĝardenon" (Malnova Testamento [ĉiam kursivgrasigas mi]).

Ĉi teksto estas do dediĉata al la dua [b] kompreno de la kulturo, al tiu de la homoj laŭdire kleraj aŭ kiuj alstrebas klerigon. Ni ja notinde ekzamenos ĉi-poste tiun apartan kulturon, kiun Françoise Sagan humure komparas kun marmelado: "ĝin oni des pli sternas, ju malpli oni havas". Ni povos observi okaze de nia esploro, ke ĉi termino konsiderinde riĉiĝos semantike laŭtempe.

NB: Cetere, ie tie, mi devos elvoki "civilizacion". Kun ĝi kompare, eĉ kontraste, devas esti plenumata serioza studado tian kulturon. Unuatempe, ni dume ne observos la koncepton *civilizacio* mem, rekte (kio estos farata poste), nur iom lumigatan de tiu *kulturo*...

* * *

Laŭ Caius Iulius Caesar belgoj estas *fortissimi* (alivorte samtempe "fortegaj kaj kuraĝaj", "bravaj" ankaŭ eblas). Kial? Tial ke tiuj koloniitoj "estas la plej malproksimaj de la ĝentileco kaj civilizacio de la respublika provinco" (*propterea quod a cultu atque humanitate provinciae longissime absunt*). Tiun kurantan tradukon de fama Komento de la roma diktatoro (*Commentarii de Bello Gallico*), kontestas Philippe Cibois. Ol *civilizacio*, tiu latinisto preferas la francan tradukon *culture* ("kulturo" [vd. franclingve http://enseignement-latin.hypotheses.org/8510]).


Tamen ne gravas ĉi tie, iu aŭ alia traduko, ĉu la kultureca, ĉu la civilizacieca. Ĉi-momente tio ne interesu nin. Ĉefe gravas la cezara rezonado, laŭ kiu eblus aserti "ju pli oni malproksimiĝas de l' centro de la kulturo-civilizacio, des pli oni fariĝas

brava" ... Estus interese meti demandon al Caesar, kion li celas unuarange. Ĉu la "bravecon" de la malproksimaj senkleraj belgoj? Ĉu, pli implice, la "ĝentilecon" de la centraj kulturitoj, civilizacitoj, nome de la romaj civitanoj? La vola-nevola dubsenco de tia lia aserto povas certe pensigi pri azena piedbato. Belgoj ne malprave suspektas tiuteme ian demagogion de la diktatoro. Saman imperian hipokritecon tutprave suspektas la gaŭloj Astérix kaj Abraracourcix en la bildstrio "Astérix chez les Belges" de Uderzo kaj Gosciny. Ĉar unu grava fakto ĉeestas en la cezara observo: la kvazaŭ senkulturo de la malfeliĉaj romianigitaj belgoj...

Streĉe rilatas al la kulturo ne nur la vortelemento "civilizaci-", ankaŭ la "kler-". *Klera* signas tiun homon, kiu kapablas "per ĝusta uzado de akiritaj scioj, klare juĝi kaj bone taksi la aferojn" (PIV). Kiel vepra kampo, estu tiel necese "kulturata" la klera homo. En 1904, la juna Lenin entuziasme konfidas al kamarado, ke Ĉerniŝevski lin "plugis ĝisoste". Ĉerniŝevski (1828-1889), estas forpasinta popolisto, aŭtoro de unua *Kion fari?*, samtitola kiel tiu fama de Lenin. Jam adoleskante (de sia 14a jariĝo), Lenin legis kaj relegis la *Kion Fari?* de sia majstro antaŭ ol verki sian propran. La fama popolisto tiel "kulturis" la estontan gvidanton de la Rusa Revolucio. Iuj maliculoj senhezite kulpigos la majstron sekvante la zamenhofan proverbon: "Laŭ la frukto oni arbon ekkonas".

Kulturo kaj ter-kulturo... Analogio ne povas esti pli "fruktodona", sen vortludi. De kie ĝi venas? La unuan metaforon oni ŝuldas al Cicero. "*Filozofio do estas kulturo de la spirito"* (*Cultura autem animi philosophia est*), deklaras tiu ĉi (*Tusculanae Disputationes*). Ni akcesore notu, ke Cicero (106-43, antaŭ la kristana Erao [ĉi-poste *AKE*]) estas la preciza samtempulo de Caesar (100-44 AKE).

Mezepoke la analogio daŭras. Sankta Gregorius (539-594), tiel priploras la



**Cicero**

morton, en sia kara *Gallia*, de la "kulturo de beletro" (*cultura literarum*, vd. lian "Historio de la Frankoj"). La respektinda episkopo de la malnova gaŭla *Turonorum* (fariĝinta nun la franca urbo *Tours*) estas fama atestanto de ĉi-tiama dekadenca epoko.

Kun Modernepoko, nia "kulturo" komencos progresive alpreni sian modernan sencon. Tio aspektas logika. La okcidentaj historiistoj tradicie ekigas Modernepokon (kaj do finas Mezepokon), de la falo de *Konstantinupolis*, la "dua Romo" kaptita de la turkoj en 1453. Ili ĝin renomos *Istanbul*. Oni notu, ke samjare okazas la fama batalo de *Castillon* (en franca regiono *Aquitaine*), kiu finas la Centjaran Militon inter francoj kaj angloj. Ja 1453 montriĝas turnopunkta jaro. La grandaj Malkovroj estas tute proksimaj...

Fakte, multaj aferoj ŝanĝiĝos de tiu tempo, en la kultura kampo kiel aliloke. Modernepoko ekas per la *humanismo*. Tiu ĉi baldaŭ celos sin rekte religi al la grek-romia kulturo, tiel bedaŭrinde preterpasante iujn interesajn civilizaciajn ligilojn historie pli freŝajn: tiun de Islamo aŭ de la eŭropa Mezepoko. Tiun "modernan" kulturon, ni retrovos logike en la koro de la naskiĝloko de la franca lingvo, nome en Touraine, la fama regiono de la kasteloj de la Loire. Tie, kelkaj junaj intelektuloj alvokitaj de granda estonteco – lingvo-naciistoj antaŭ la vorto – fondas la skolon de *La Pleiade*. Inter ili Ronsard kaj Du Bellay.

Du Bellay redaktas en 1549, 27-jaraĝa, sian eseon "Defendo kaj Ilustrado de la Lingvo Franca" (*Deffence et Illustration de la Langue Francoyse*). La juna homo estas entuziasma apoganto al riĉigo de la franca, tiam povrega, ĉu per ampleksigo de ekzistantaj vortsencoj, ĉu per enkonduko de neologismoj plukitaj en diversaj regionaj dialektoj. Li notinde emfazas la neceson "*fruktigi la lingvon per* (*diligenteco kaj*) *kulturo"* . Antaŭ ol fruktigi, poste kolekti maturajn fruktojn, ĉu ne necesas jam nepre *kulturi*? Ja kun Du Bellay kaj Ronsard havas ni du majstrojn de tiu fundamenta lingva arto, du lertajn plugistojn do.

Sed jam en la najbara Anglio aperis *Utopia* (1516) de Thomas Morus. En tiu fama insulo "nenie troviĝanta" (etimologie), la fama konkerinto "Utopus" sukcesis tutsola eduki la loĝantaron, kiu de tiam superas ĉiujn aliajn popolojn *cultus, humanitisque* ("laŭ kulturo, humaneco", kion eblas



**Du Bellay**

ankaŭ traduki "*civilizacie*")... Do ankaŭ la granda reĝo Utopus iel "plugis ĝisoste" sian popolon, samkiel Ĉerniŝevski rilate al Lenin...

... Antikveco, Mezepoko, Renesanco... Historio rapide flugas... Renesanco pluiĝas per la epoko *Klasikisma*. La nomo *Baroka* tutcerte pli konvenas al Pufendorf, tial ke tiu filozofo naskiĝis en norda Germanio (1632, urbo *Zwönitz*, Prusio), epoke de la katolika Kontraŭreformacio: la cignokanto de la malnova Inkvizicio. Li do konas la sangabundan Tridekjaran militon. La unua "inter-naciisma" milito en la historio estas jam "religia". Pufendorf, filo de luterana pastoro, do de fundamentisma monoteisto, plene suferas pri tiu Kontraŭreformacio plenumita de aliaj religiaj fanatikuloj.

Pufendorf defendas ideon laŭ kiu la homo "*ricevis donacojn pliajn ol la naturon"*, la tiel nomataj donacoj igantaj ĉe ĝi "*kulturon rimarkindan kaj fruktodonan"* (*eximiam et fructuosam culturam*). Ja la kulturo diferencigas la homon de la naturo laŭ tiu vidpunkto (publikigita en *De iure naturae et gentium*, 1672). Tiu aŭtoro restas tute fidela al la biblia tradicio, kun la fama ordono de Dio al Adam kaj Eva: "Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero"... Tiuteme ne estas tute superflue scii, ke en la momento mem kiam Pufendorf estis junulo, René Descartes – granda raciisto – predikas *Metodon* logike racian, kiu kapablas fari la homon "mastro kaj posedanto de la naturo". Iu nova kulturo, definitive disiganta homon kaj naturon, tiam disvolviĝas en Okcidento.

* * *

Kiel konkludi (provizore)? Nepras unue serĉi, kiam nia afero komencis



**Pufendorf**

degeneri. Jam en 380, la edikto de Tesaloniko starigas la kristanismon kiel ŝtatan religion. La romia imperiestro Theodosius la Granda, tiam malpermesas la paganajn kult(ur)ojn, kultojn interalie al la "Nevenkita Suno" (*Sol Invictus*). Tiu prakulturo estas tiam bone disvastigita. De tiu momento la vermo estas en la frukto. Tamen necesos atendi longan tempon antaŭ la putrado. Ĝis Renesanco kaj malgraŭ pli ol du jarmiloj da monoteismo progresanta, poste fariĝanta ŝtata religio, iu implica respekto al la naturo sukcesos pluiĝi ĉe la plejmultaj kamparanoj, kvazaŭ kriptaj paganoj. Tiu senaĝa tradicio iele harmoniigas Homon kun Naturo... aŭ reciproke.

Tian kulturon alternativan, daŭre viveman kore de iuj kamparanoj malproksimaj de la centraj civilizacioj, eblas ankaŭ nomi *panteismo*. La vorton ni ŝuldas al Spinoza. Tiu kulto montriĝas senteble pli tolerema al la kredoj de la "aliuloj", kiaj ajn ili estas. Ja pli malnova, tiu ĉi tradicio ĉiam harmoniigis Dion, homon kaj naturon. Delonge la pagana homo, kvazaŭ sinbanis en la senfina universo.

De la fino de la 15a jarcento, en la *Italia* de "l' Quattrocento" (nia 15a jarcento), poste en la tuta Okcidento, io nova intervenas: la *humanismo*. Markas veran turnopunkton Giovanni Pico della Mirandola, granda plurlingva klerulo, prapatro de la tiel nomata humanismo: "Mi legis en la skribaĵoj de la araboj (*NB*: aliaj grandaj monoteistoj), ke sur la vasta scenejo de l' mondo ekzistas nenio pli admirinda ol la homo" (*Oratio de hominis dignitate*, 1484) ... La admirinda homo, kun la tuta naturo sube kompreneble. Tiam la ŝanĝo akcelos en Eŭropo...

Paradokse, en la preciza momento kiam la humanismo disvolviĝas, Inkvizicio kaj la aliaj sorĉistin-ĉasadoj paroksismiĝas. Oni neniam bruligis tiom da malfeliĉaj virinoj, ol en tiu fino de la 16a jarcento. La malestimata




**Giovanni Pico della Mirandola**

Mezepoko estis ja malpli kruela! Dum jarcentoj la monoteistoj ne ĉesis batali, por eltiri de la homaj spiritoj ĉian paganan filozofion. Ili obsede provis tiel kvazaŭ lobotomigi la homaron. Tiel, de la malfrua Antikveco, ia ŝtat-religia kulturado, monoteisma kaj maltolerema kulturado, entreprenis *pluĝi* la popolojn siamaniere. Tiu relative nova historia tradicio (la monoteismo tiam estas pli ol dumiljaraĝa) tiel montriĝas kiel *suben-alikulturado*.

Nia proksimiĝo al tiu kultureca problemo estis ĝisnune *filologia*. Oni tamen bone vidas, ke malantaŭ tio kaŝiĝas pli fundamente aferoj etnologiaj, antropologiaj, eĉ politikaj. Tion ni devos venonte esplori.

Ĝemil Ksus





# Enigmoj

## Solvoj

### Detranĉado

Jen la solvo:





### Satana malsano

Estis 5 malsanuloj. Kial? Jen la respondo. Unue mi precizigas al vi, ke mi uzas matematikan indukton.

Mi rememorigas al vi, ke la sola momento, kiam ili povas vidi unu la alian, estas dum la kunsido. Do estas la sola momento, kiam ili povas diveni, ĉu ili estas malsanaj aŭ ne. Por bone kompreni, mi unue supozas, ke estas nur unu malsanulo.

- Unu malsanulo. Ĉiuj SAT-anoj vidas aŭ unu, aŭ neniun malsanulon (laŭ la okazo, ĉu la SAT-ano, kiu rigardas, estas malsana aŭ ne) dum la kunsido. La malsanulo vidas, ke neniu estas malsana, li deduktas, ke li estas la sola malsanulo. Do li foriros post la kunveno. La duan tagon ne plu estos malsanulo.

Do por resumi, 1 malsanulo => 1 foriro la unuan tagon.

- Du malsanuloj. La unuan tagon ĉiuj SAT-anoj vidas aŭ unu malsanulon aŭ du (laŭ la okazo, ĉu la SAT-ano, kiu rigardas, estas malsana aŭ ne) dum la kunsido. Ĉiu malsanulo vidas unu malsanulon, li "deduktas", ke eble li ne estas malsana. Neniu foriras la unuan tagon. La duan tagon, ĉiu malsanulo vidas, ke neniu foriris. Li deduktas, ke li mem estas ankaŭ malsana. La du malsanuloj foriros la duan tagon post la kunveno.

Do por resumi, 2 malsanuloj => 2 foriroj la duan tagon.

- Tri malsanuloj. La unuan tagon ĉiuj SAT-anoj vidas aŭ du malsanulojn aŭ tri (laŭ la okazo, ĉu la SAT-ano, kiu rigardas, estas malsana aŭ ne) dum la kunsido. Ĉiu malsanulo vidas du malsanulojn, li "deduktas", ke eble li ne estas malsana. Neniu foriras la unuan tagon. La duan tagon, ĉiu malsanulo vidas, ke neniu foriris. Li deduktas, ke estas du aŭ tri malsanuloj. Neniu foriras la duan tagon. La trian tagon, ĉiu malsanulo vidas, ke neniu foriris, li deduktas, ke li mem estas ankaŭ malsana. La tri malsanuloj foriros la trian tagon post la kunveno.

Do por resumi, 3 malsanuloj => 3 foriroj la trian tagon.

Tiel oni povas daŭrigi ĝis la kvina tago, do estis kvin malsanuloj.

## Solvo de Serĝo por "Satana malsano"

Je la unua kunveno, se iu kongresano vidas neniun kapon kun ruĝa makulo, ĉar nepre devas esti unu, li konkludu ke li mem havas tiun makulon. Li do foriras la morgaŭon.

Je la unua kunveno, se iu kongresano vidas unu nuran kapon kun makulo, kaj se la morgaŭan tagon li revidas tiun kapon (kiu devus foresti se li estus la sola laŭ la logiko ĉi-supre indikita), tio signifas ke li mem estas malsana.

Tiun rezonadon oni povas apliki rikure (*): tri tagoj bezonataj por 3 malsanuloj, 4 por 4 malsanuloj, ktp.

En la proponita problemo, post 5 tagoj, ĉiuj malsanuloj forestis, ili do estis 5. La nombro da SATanoj (53) tute ne influas.

(*) Rikuro (foje nomata "rekursi") estas klaso de objektoj aŭ metodoj difinitaj per simpla baza kazo (almenaŭ unu) kaj aro de reguloj, kiuj reduktas ĉiujn sekvajn kazojn ĝis baza(j) kazo(j). En la ĉi-supra problemo, la baza kazo estas kiam nur unu kongresano malsanas. Se estas pli, oni reduktas al kazo minus 1, ĝis oni atingas la bazan kazon (nur unu malsanulo). La nombro da etapoj egalas la nombron da tagoj/malsanuloj.

Rikuri uziĝas ankaŭ en la signifo de "referenci al si mem" (PIV); ĝi uziĝas pli funde en logiko kaj informadiko.

Ekzemplo de rikura difino:

*Praulo*, estas unu el la gepatroj, aŭ unu el la gepatroj de *praulo*. (Praulo difiniĝas per frazo uzanta "praulon" = la difinitan vorton mem.)

Tio, ece rikura, tute ne ecas matematike.

# Novaj enigmoj

### Kalkulo

Kiel fari por havi la nombron 24 uzante unufoje ĉiujn nombrojn 5,5,5, kaj 1? Oni rajtas adicii, subtrahi, obligi kaj dividi.

### Stranga familio…

La familio Espero havas 5 infanojn. Duono de ili estas knabinoj. Kiel klarigi tion?

### Falsa aŭ ĝusta ekvacio?

Jen falsa ekvacio.

XI+I=X

Kiel fari, por ke, sen ŝanĝi ion ajn, ĝi iĝu ĝusta?

DIANA RIŜAR

# Pri diversaj kredofobioj

Kiam Andronikus de Rodo faris sian faman rekolekton de la verkoj de Aristotelo, li trovis finfine kelkajn verkojn neklaseblajn, kiujn li arigis kaj nomis meta-fiziko: "kio venas post la fiziko" aŭ "kio ĝin transpasas". "Ĉiu fiziko estas metafiziko", asertas Einstein (fama honorprezidanto de iu SAT-kongreso). En ĉiu verko pri konkretaj aferoj, pri pozitivaj sciencoj, ekzistas nediritaj aksiomoj, neformulitaj antaŭsupozoj.

Estas famkonata la einstein-a sentenco "Mi ne kredas, ke Dio ludas kun ĵetkuboj" (letero al Ilse Rosenthal-Schneider). Al rabeno, kiu demandis al li, ĉu li kredas je Dio, Einstein respondis: "Mi kredas je la Dio de Spinoza". Ambaŭ homoj, la sciencisto kaj la filozofo, estis panteistoj, identigantaj homon, naturon kaj Dion, kio ne estas precize la vidpunkto de ateistoj.

Cetere, tiuj diferencaj kredoj senteble kontraŭis la homojn unu al aliaj ĝisnune. La maltoleremo estas la plej bone disvastigita afero en la mondo. La unuaj kredo-maltoleremuloj en Okcidento estis en la klerikaro de la Eklezio. Ili subpremis ĉiujn, kiujn ili konfuze nomis "ateistoj". Dekomence, la veraj ateistoj estis malmultnombraj kompare kun la paganoj kaj aliaj panteistoj. Post kiam ilin daŭre persekutis la Eklezio, venis ilia reago, komence de la "senkristanigantoj" dum la Franca Revolucio. Siavice tiuj ĉi subpremis la katolikan klerikaron. De tiam komenciĝis nova kontraŭklerikala tradicio, kiu baldaŭ kontraŭis ĉiujn religiojn. Tion oni povas observi de Hispanio (kie anarkiistoj transformis preĝejojn al porkejoj) ĝis Kamboĝo (kie la ruĝaj kmeroj same faris al la moskeoj), pasante tra la tuta historio de Sovetunio.

Tio ne estas hazardo, ke du ĉefaj bastionoj de SAT, Hispanio kaj Francio, estas patrujoj de pastrofobiuloj (en Francio oni diras pastrovorantoj, "bouffeurs de curé"). La Franca Revolucio, la Pariza Komunumo, la Enlanda Milito de Hispanio, kun siaj sangabundaj subpremoj, havis sekvojn, reagojn. Rezulte, en nia moderna historio, ĉiuj: kristanofobiuloj, islamofobiuloj, kredofobiuloj, laboristofobiuloj, burĝofobiuloj… ĝojege murdis unu la alian!!! Ĉiu siavice!!!

Fobio estas psika malŝato venanta de iu timo. Malantaŭ ĉiu fobio kaŝiĝas granda timo. Eĉ la agresemo venas de timo, la psikologoj bone konas tiun fenomenon. Tro agresema homo estas iama granda agresito, foje eĉ seksperfortita.

Cetere ekzistas multaj kategorioj de fobiuloj. La ksenofobio ekzemple montras al ni senfinajn kategoriojn laŭ la celo de la koncernata fobio: etno, raso aŭ religio. Eblas ankaŭ trovi reĝofobiulojn, en Francio aŭ Rusio. Ĉiun 21-an de januaro francaj liberpensuloj manĝas bovidkapon (frandan francan pladon). El kie venas tiu tradicio? Tio tute ne estas pro la datreveno de la morto de Lenin (fama reĝmurdisto), sed pro tiu de Louis la 16-a, la senkapigita reĝo, kiu spertis la saman sorton kiel tiun de la Romanovoj longtempe antaŭe.

Inter la liberpensuloj ekzistas multaj framasonoj, tio estas ĉies sekreto. Inter ili multaj kontraŭklerikaluloj, memkompreneble. Tiuj ĉi kutime ŝatas moki la ritojn de la eklezio. Nu, ili havas la samajn ridindajn ritojn en sia framasona hierarkio (hierarkio estas alia vorto por "klerikaro"). Mi persone respektas ĉiujn ekleziojn kun ties ritoj, kondiĉe ke ili respektas miajn kredojn.

ĜEMIL

*Oktobro 2015*

# CARMENES

**Unuaj sukcesaj provoj per la nova planed-ĉasilo "CARMENES"**

CARMENES, rimarkinda kaj nova astronomia instrumento, projektita por serĉi planedojn similajn al la Tero, sukcese trairis la unuajn ĉe-teleskopajn provojn "sur la ĉielon". Sciencistoj kaj inĝenieroj el pluraj esplor-institutoj partoprenis la projekt-adon kaj konstruadon de la nova "planed-ĉasilo". Post kvin-jara prepar-laborado, ĉi tiu ege kompleksa instrumento estis uzita unuafoje la pasintan Novembron ĉe la 3,5-metra teleskopo de la Observatorio *Calar Alto* apud *Almería*, suda Hispanio, scienc-teĥnika instalaĵo kune funkci-igata de la germana Max-Planck-Societo (MPG), kaj de la hispana Supera Nacia Konsilio por Esplorado (CSIC). CARMENES estis projektita kaj konstruita de granda internacia konsorcio, kiun konsistigas dek unu institucioj el Germanio kaj Hispanio. La instrumento enhavas du spektro-skopojn por analizi la videblan kaj infraruĝan lumon elsenditan de la ĉielaj objektoj. Ambaŭ partoj estis plejbonigitaj por malkovri planedojn, kiuj rondiras ĉirkaŭ steloj proksimaj al la Suno. Do, la observado per CARMENES metos gravajn mejlo-ŝtonojn por unu el la plej emociigaj kampoj en la kosma esplorado: la serĉo de alia Tero.

Kiam ili serĉas planedojn ĉirkaŭ aliaj steloj ekster nia Sunsistemo, esploristoj volas kompreni kiel kaj kie naskiĝis tiuj objektoj, kaj elscii, ĉu iliaj kondiĉoj taŭgas por subteni vivon. Ĝis nun, oni malkovris pli ol du mil tiajn objektojn, kiujn oni nomas *ekstersunaj planedoj*.

"Tamen, la plejmulto el ili estas maltaŭgaj por vivo", klarigas profesoro *Andreas Quirrenbach*, fakulo pri planed-serĉado kaj ĉefa esploristo de la teamo CARMENES. "Do, ni serĉos planedojn, kiuj orbitas ĉirkaŭ steloj el la kategorio de 'M-nanoj'. Tiuj estas tre malgrandaj steloj, kiuj povus prezenti varmetajn kondiĉojn por planedoj proksimaj al si, en orbitoj, kie CARMENES kapablos ilin detekti".

"M-nanoj estas ege pli malvarmaj kaj ruĝaj ol la Suno, kaj tial ili elsendas la plejmulton el sia lumo ĉe la infraruĝa parto de la elektro-magneta spektro. Do, ni konstruis unikan spektroskopon, speciale taŭgan por detekti tian infraruĝan lumon", aldonas la doktoro *Pedro Amado*, kiu estas la hispana respondeculo pri la projekto kaj la sciencisto, kiu direktis la konstruadon de la spektroskopo por infraruĝa radiado.

Aldone, tiaj steloj havas ege longajn vivojn, kio provizas la kondiĉojn bezonatajn por subteni tempodaŭran biologian evoluon. Agnoskinte la gravecon de ĉi tiu planed-serĉado, la Observatorio decidis dediĉi al ĝi sescent noktojn da observado per sia plej granda teleskopo. "Specifaj projektoj tiel grandaj estas tre maloftaj en moderna astronomio", komentas doktoro *Jesús Aceituno*, vic-direktoro de la Observatorio. "Per CARMENES, *Calar Alto* iĝos tutmonda referenc-loko pri serĉado de Ter-similaj planedoj, kaj okupos lokon ĉe la avangardo de la plej moderna astromia instrumentaro".

Rekte detekti ekstersunajn planedojn per normalaj bildoj estas malfacile, kaj konsistigas grandan defion pro la troa brilo de la apudaj steloj, kiuj elsendas miliardoble pli da energio ol la planedo kaj ankaŭ troviĝas tre proksimaj de ili. La sciencistoj, do, uzas la gravitan altiron, kiun la planedo faras sur sian gastigantan stelon.

"La stelo kaj la planedo, ambaŭ rondiras unu la alian, kiel paro da glitistoj, kiuj dancus cirkle, tenante la manojn unu de la alia", diras doktoro *Ignasi Ribas*, kiu respondecas pri la planado de la observ-programo CARMENES. "Sed imagu, ke unu el tiuj glitistoj estus tre malgranda kaj maldika: do la alia moviĝus nur tre malmulte".

Se temas pri steloj kaj planedoj, la mas-diferenco estas tiel ega, ke la stelo moviĝas kun rapido simila nur al tiu de simple piediranta persono, ĉirkaŭ kelkajn metrojn en sekundo, dum la planedo irus tra la spaco ĉirkaŭ la stelo je pluraj kilometroj en sekundo, eĉ pli rapide ol Luna raketo Saturn-V. Sed la ekzisto de la planedo evidentiĝas nur danke al la movo de la stelo, ĉar tiu movo kaŭzas la klasikan ŝovon de linioj ĉe la stela spektro, la tiel nomata *Dopplera ŝovo*. Tiu ŝovo de la spektraj trajtoj respondas al malgrandaj ŝanĝoj de la *observata* koloro de la stelo, pro la movo de la stelo laŭ la vid-linio, rekte al aŭ de la observanto. Danke al sia mirinda teknologio, CARMENES kapablas detekti tiel malgrandajn ŝovojn.

Doktoro *Walter Seifert*, respondec-ulo pri la konstruado de la spektro-skopo por videbla lumo, rimarkigas: "Ni devis konstrui instrumenton sufiĉe stabilan por mezuri tiajn tre malgrandajn stelmovojn, al kaj de ni, dum ilia orbita danco".

"Kunigi datumojn el ambaŭ spektroskopoj provizas multe pli da informo ol tiu alirebla per iu ajn antaŭa simila instrumento, kaj tio helpas nin distingi surfacajn stel-makulojn disde signaloj kaŭzitaj pro planedaj kunuloj", asertas profesoro *Ansgar Reiners*, kiu faris detalajn kalkuladojn pri la mezur-kapabloj de CARMENES. "Do, ni esperas, ke ni malkovros dekojn da eble loĝeblaj planedoj dum venontaj jaroj".

Por ebligi tion, la kapabloj de CARMENES estis karakterizitaj kaj plejbonigitaj dum la lastaj semajnoj. La teamo kolektos la unuajn sciencajn datumojn depost la unua tago de 2016.

Pli da informo pri CARMENES: https://carmenes.caha.es

David Galadí



**Calar Alto**

# Librotago en Vieno

La 15an de decembro ni festis, en la "Literatur-bufedo" en Vieno (Aŭstrio) la librotagon 2015.

La literatur-bufedo estas librejo kaj kafejo. La posedanto (kune kun sia edzino Andrea), Kurt Lhotzky, apartenas al SAT kaj al la Aŭstria Esperanto-Federacio. Tial la librejo prezentas sortimenton de libroj en la internacia lingvo.

La afiŝo, kiu anoncis la librotagon, montras desegnon kun portreto de Zamenhof kaj kun diversaj bestoj kiuj postulas "liberecon", "pacon" kaj "neniam militon". Kontraŭe videblas generaloj malamike rigardantaj la bestojn kaj pensantaj pri armiloj. La desegnon verkis kaj disponigis Christian Feichtinger, konata grafikisto.

Posttagmeze, interesitoj povis informi sin pri Esperanto kaj partopreni al "fulmokursoj" en nia memelektita lingvo.




Okaze de la librotago, vespere ni montris la filmon "Esperanto" de la Eldona Fako Kooperativa de SAT, realigita de la filmisto Dominiko Gaŭtiero (Dominique Gautier). Sekve, Christian Cimpa, kunlaboranto en la sekcio pri planlingvoj de la Nacia Biblioteko en Vieno, mem verkisto, tradukanto kaj kanttekstfaristo, recitis "kontraŭknalajn" poemojn. Laŭ nia scio, ĉi tio estis mondpremiero.

Cetere, ni babilis, frandis, trinkis kaj festis la doktoron Zamenhof. Konforme al intenco de la librotago, ĉiu gasto ricevis libron kiel donacon.

KURT LHOTZKY

# Finfine "Bohemiaj lumoj" vidis la lumon

"*Luces de bohemia* (Bohemiaj lumoj) estas por mi la plej bona teatraĵo en la hispana lingvo kaj unu el la plej gravaj verkoj en la historio de la hispana literaturo. Ĉu mi troigas? Eble jes. Ĉu ne preferindus nuanci tiel drastan aserton? Tute ne. Pri ĉi majstraĵo mi nek povas nek volas paroli senpasie kaj senpartie. Jam de mia konatiĝo kun ĝi, mi ne sukcesis eskapi el ĝia mirinda envulto. Feliĉe! Kiomfoje mi plonĝas ĝiasinen, ĝi envolvas min en sian simfonion de paroloj kaj de homoj kaj de faroj... kiuj instruas min, hispanon multflanke fremdan al mialandaj kutimoj kaj moroj, pri tio, kion signifas hispani".

Tiel komenciĝas mia enkonduko en ĉi verkon. Ampleksa kaj nepra enkonduko en la biografion de la aŭtoro, Ramón del Valle-Inclán (1866-1936), en la teksbazon de lia ĉefverko kaj en la epokon, kie ĝi disvolviĝas. Ĉar, se la tolstoja *Milito kaj paco* estas superba friso de deknaŭajarcenta rusa historio, *Bohemiaj lumoj* estas superba friso de dudekajarcenta hispana historio, kies ĉefajn ŝlosilojn la leganto devas posedi por traĝui la tutan intrigon.

Ĉi-verke la aŭtoro inaŭguris novan literaturan ĝenron nomatan esperpento, resumeblan en jenan ekvacion: esperpento egalas dialektikan sintezon de tragika kaj groteska.

Traduki *Luces de bohemia* konstituas grandan defion pro la simpla fakto, ke ĝi netradukeblas. Nu, ĝuste tial mi entreprenis ĝian esperantigon. En ĝi uzatas plej diversaj slangoj, ĵargonoj, parolturnoj... el plej diversaj sociaj tavoloj de la dudekaj jaroj, lingvaĵoj nekompreneblaj eĉ por nuntempaj hispanoj. La tuta traduko plenas de notoj kaj klarigoj, dank' al kiuj eĉ hispanaj e-istoj, kiuj neniam trae komprenis la verkon, povos nun ĝin traĝui.

Ja 95 jarojn post ol ĝi naskiĝis, *Luces de bohemia* restas viva en la memoro de la madrida popolo! Ĉiun 26an de marto, la antaŭvesperon de la Internacia Tago de la Teatro, eblas partopreni en *La noche de Max Estrella* (La nokto de Makso Stelo). Ĝi konsistas en grupa irado tra la vojo sekvita de la protagonisto Makso Stelo kaj ties *alter ego* (alia memo), Sinjoro Latino de Hispalis, en la senmorta

verko de Valle-Inclán. Simila aranĝo havas lokon en Dublino, ĉiun 16an de junio, sub la nomo *Bloomsday* (Tago de Bloom) honore al Leopold Bloom kaj Stephen Dedalus, protagonistoj de *Uliso*, de James Joyce, verko mult-flanke ĝemela de *Bohemiaj lumoj*. Nu, niaflanke, ĝis nun ni madridaj esperantistoj organizis du tiuspecajn aranĝojn sub la nomo *Bohemiaj noktoj*. En la fino de la libro, mi priskribas ilin, reproduktas la sciigojn surloke faritajn pri stratoj, personoj, monumentoj... la deklamitajn poemojn, la tekstojn de la kantitaj kantoj...

Alveninte al la fino de mia laboro, mi sentis la fieron, ke ankoraŭfoje Esperanto venkis literature. Eĥiĝis ĉe mi la vortoj de Fernando de Diego en ties enkonduko al la romano *La familio de Pascual Duarte*, aperinta kiel n-ro 1 de la kolekto Hispana Literaturo: "Mi ne dubas, ke ankaŭ ĉi-foje nia Esperanto sukcese transsaltis la barieron de ĉi nova defio al siaj kapabloj beletraj". Ankoraŭfoje ĝi ebl-igis traduki netradukeblan majstraĵon el la eŭropa literaturo de la dudeka jarcento. Mi feliĉas.

(Ramón del Valle-Inclán, *Bohemiaj lumoj*, en traduko de Miguel Fernández, n-ro 11 de la kolekto Hispana Literaturo, Madrida Esperanto-Liceo, Madrido, 2015, 176 p., mendebla ĉe la UEA-libroservo).

MIGUEL FERNÁNDEZ


# Pri sennaciismo en universitata revuo / hispana traduko de la Manifesto de la sennaciistoj

La 4-an de januaro publikiĝis la hispanlingva artikolo "*¿Qué es el anacionalismo?*" (Kio estas sennaci-ismo?) [1], kies originala versio aperis en revuo de Universitato de Murcio (Hispanio) kiel precipa artikolo sub la titolo "*Anacionalismo y anarquismo en el siglo XX*" (Sennaciismo kaj anarki-ismo en la 20-a jarcento) [2]. La aŭtoro estas universitata profesoro, Bernat Castany Prado, kiu ne estas esperant-isto. La analizo farita estas detala kaj, el historia vidpunkto, mi taksas ĝin tre ĝusta. Poste estas aperinta ruslingva versio [3]. En la revuo tiu artikolo estas akompanata de hispanlingva traduko de la *Manifesto de la sennaci-istoj* (la traduko aperas en la suba parto de la ligita dokumento). Ĉi traduko estas realigita de la aŭtoro mem, Bernat Castany, surbaze de la franc-lingva versio de L.G. Avid kaj G. Waringhien. La traduko estas zorge realigata. La teksto estas libere reproduktebla sub licenco Creative Commons BY-NC-ND, do bezonatas citi aŭtoron kaj originalan version, ne eblas uzi ĝin komerco-cele kaj devas esti menciata la ekzistado de tia licenco.

PEDRO SANZ

[1] https://www.diagonalperiodico.net/saberes/28886-es-anacionalismo.html
[2] revistas.um.es/cartaphilus/article/download/247571/188311
[3] http://www.aitrus.info/node/4516





Cartaphilus
Revista de investigación y crítica estética
ISSN: 1887-5238 n.º13 |2015 | pp. 173-204

ANACIONALISMO Y ANARQUISMO EN EL SIGLO XX.
SEGUIDO DE UNA TRADUCCIÓN DEL
*MANIFIESTO DE LOS ANACIONALISTAS* (1931),
DE EUGÈNE LANTI

BERNAT CASTANY PRADO
Universidad de Barcelona

Eugène Lanti en 1933.

# Letero al eks-jugoslavaj kamaradoj pri la Konstitucio de 1974

Dum la malfruaj 1960-aj jaroj estis granda socia aktiveco. En tiu periodo estis granda intereso pri 'laborista kontrolo' en landoj okcidentaj. En 1968, en Francujo kaj Italujo la postulo de la laboristoj estis por pli da potenco rilate la labormedion. En Ĉeĥoslovakujo la celo de la aktiveco estis la kreado de pli demokrata socio: la Praga printempo. En 1974 en la tiama Jugoslavujo, la Tito-registaro dekretis novan konstitucion, kies celo estis pligrandigi demokration ĉe la plej bazaj niveloj de la socio. (Mi volas enfokusigi sur firmaon aŭ aliajn laborlokojn.)

La signifo de tiu provo ne povas esti tro alte taksita:

1. Estis grandega plialtigo de demokratio kompare kun Sovetunio;
2. En kapitalismaj landoj, la decidpovo en la labormedio restis ĉe la posedanto aŭ ĝiaj administrantoj.

En mia lando, Aŭstralio, la nova registaro, tiu de la Laborista Partio, establis enketon por plibonigi la funkciadon de la fabrik-industrio. La komitato, kiu gvidis tiun enketon sendis en 1975 reprezentanton de sindikatoj kaj dungantoj al Jugoslavujo por lerni pri la Konstitucio. Mi partoprenis kiel reprezentanto de Sindikatoj Aŭstraliaj.

Ŝajnis al mi, ke la Konstitucio de 1974 estis serioza provo ŝanĝi la kulturon en la labormedio. Ĝi aparte intencis ekipi la laboristojn per la kapableco fari decidojn, ne nur pri la tasko aŭ la tuja areo de laboro, sed ankaŭ ĉe pli altaj niveloj en la firmao. Post taŭga edukada programo ili havus la respondecon pri la efika funkciado de la fabriko aŭ alitipa entrepreno. Ŝajnis al mi, ke la Konstitucio havis la celon ankaŭ pligrandigi la nivelon de demokratio ĉe la labormedio.

Ekde la komenco de tiuj eksperimentoj, oni povus pensi, ke la demokratia 'metodo' disvastiĝos tra la tuta socio, ĉar homoj povos vidi, ke la propra socia potenco estas pli granda, ke ili havas la ŝanĉon plibonigi sian vivon kaj doni al ĝi pli da signifo.

Mi volas scii, ĉu la Konstitucio funkciis tiel, ie? Laŭ mia kompreno, Slovenio estis la plej evoluinta regiono de Jugoslavujo, kaj pro tio mi atendus, ke la efikoj de la Konstitucio daŭrus pli longe tie ol aliloke.

Mi demandas al mi, ĉu, post la falo de Jugoslavujo, la sindikatoj kaj gelaboristoj ankoraŭ aprezis la Konstitucion kaj batalis por efektivigi ĝin.

Mi aprezus kiun ajn informon, kiun *Sennaciulo*, aŭ aliaj, povas doni al mi.

Amike, kaj dankon pro via atento.

GERRY PHELAN,
*1550 Dooralong Road,*
*Dooralong NSW 2259,*
*AŬSTRALIO.*
*Retadreso: phelangerry2@gmail.com*
*8-a de januaro 2016.*



# Aliĝintoj al SAT-Kongreso en Hercbergo


Aliĝintoj: 48 personoj el 12 landoj, 4 kontinentoj (stato 2016.03.31)

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 27 | s-ino | TOUBALE | Franciska | AU |
| 17 | s-ro | ROOKE | Dieter | CH |
| 8 | s-ino | HENRY-ZHANG | Manjuan | CN |
| 10 | s-ino | ZHANG | Hong | CN |
| 9 | s-ino | GONG | Xiaofeng | CN |
| 47 | s-ino | WANG | Yuping | CN |
| 12 | s-ino | OELBE | Marietheres | DE |
| 33 | s-ino | KÓRÓDY | Zsófia | DE |
| 34 | s-ro | ZILVAR | Peter | DE |
| 35 | s-ino | LUSZCZEK | Cornelia | DE |
| 36 | s-ro | JAKOWSKI | Walter | DE |
| 39 | s-ro | JANKOWSKI | Johannes | DE |
| 43 | s-ro | KERN | Otto | DE |
| 44 | s-ro | LANGHOLF | Andreas | DE |
| 45 | s-ro | Mickle | Gary | DE |
| 46 | s-ino | CHIKATO | Jutta | DE |
| 11 | s-ro | MERLA | Frank | DE |
| 22 | s-ro | PYYKKO | Kari | FI |
| 4 | s-ro | MARKOV | Vito | FR |
| 5 | s-ro | MARKOV | Vinko | FR |
| 7 | s-ro | HENRY | Bruno | FR |
| 14 | s-ro | SIRE | Serĝo | FR |
| 15 | s-ino | GABALDA | Liba | FR |
| 16 | s-ro | GABALDA | Floreal | FR |
| 18 | s-ino | MONNERET | Jocelyne | FR |
| 19 | s-ino | GIRARD | Veronik | FR |
| 24 | s-ino | GUEGUEN | Claudine | FR |
| 25 | s-ro | LE PUIL | Ĵak | FR |
| 26 | s-ino | LE PUIL | Armela | FR |
| 28 | s-ino | ÉCHAPPÉ | Lucette | FR |
| 29 | s-ino | MAUBOUSSIN | Caroline | FR |
| 30 | s-ro | BRESLER | Lucien | FR |
| 37 | s-ro | MARTIN | Guy | FR |
| 38 | s-ino | MARTIN | Franjo | FR |
| 42 | s-ino | PINET | Thérèse | FR |
| 3 | s-ino | GRIFFON | Annie | FR |
| 41 | s-ro | WADE | Michael | GB |
| 6 | s-ro | PRENT | Arturo | GB |
| 2 | s-ro | BOURLOT | Carlo | IT |
| 40 | s-ro | LA FORGIA | Andrea R. | IT |
| 31 | s-ro | CAPPA | Giulio | IT |
| 13 | s-ino | TAHIRA | Masako | JP |
| 48 | s-ro | KANG | Hong-Hu | KR |
| 1 | s-ino | RALALARISOA | Lala (Justine) | MG |
| 21 | s-ro | MOERBEEK | Rob | NL |
| 23 | s-ro | NOBEL | Ronaldo | NL |
| 32 | s-ino | CHEIZOO | Korine | NL |
| 20 | s-ro | DE WIT | Bert | NL |

| | | |
|---|---|---|
| AU: | Aŭstralio | 1 |
| CH: | Svislando | 1 |
| CN: | Ĉinio | 4 |
| DE: | Germanio | 11 |
| FI: | Finnlando | 1 |
| FR: | Francio | 18 |
| GB: | Britio | 2 |
| IT: | Italio | 3 |
| JP: | Japanio | 1 |
| KR: | Koreio | 1 |
| MG: | Madagaskaro | 1 |
| NL: | Nederlando | 4 |

# LA KORTO

**Rakonto, Kristian Lundberg, 2015, 146 paĝoj, esperantigita de Gunnar Gällmo, eld. Sveda Laborista Esperanto-Asocio**




Jen nevola sperto de verkisto kiu iam konstatis ke "Dagens Nyheter" – la matena sveda ĵurnalo plej legata – enhavis grandan recenzon de unu el liaj prozlibroj. Sed ne povante vivteni sin, li iĝis laboristo antaŭe ĉe DHL, kie li portis pakaĵojn, nun horpage dungita por nekvalifikita laboro en la griza, frosta, pluva haveno de Malmö en 2008, epoko de krizo por la aŭtoproduktado. Li devas veturigi aŭtojn al la taŭga parkejo. Li asertas: "Ĉion kion [tiele] mi rakontas estas vero. Kion mi priskribas, tion mi travivis". Revenas la vortoj soleco, manko de libereco, mallumo, ombro, rutinoj, malsano, frenezo, morto. "Mia falo estis granda kaj tio doloris. Mi venis al la limo". Humiligite, li havas la impreson esti neniulo, ĉar li jam faris tiun laboron antaŭ dudek jaroj, sed tiam li estis rapide alie dungita.

La frazoj estas mallongaj, kvazaŭ la verkisto estus elĉerpita kaj povus nur aldoni unu vorton post la alia: "La Korto. La 'Yard'. Senfina parkejo dividita en pli etajn rektangulojn. Ĉirkaŭ ĉio bariloj, rutinoj, reguloj. Trafiksignoj. Transportdistancoj. Haltlinioj. Senfine eta mondo ene de alia". Fakte, li estas ĝismedole laca. "Mevoj. Birdetoj. En la kapo zumas ĉiuj pensoj kaj vizaĝoj. En la korpo verŝajne estas malvarmumo. Febro. Tusado". Tamen necesas labori. "Malgraŭ tio mi estis surloke, ĉar mi neniam scias kiam venos alia okazo. Se oni malakceptas laboron, oni estos la lasta en la listo. Neniu agnoskos ke ekzistas tia listo. Mensogi estas travivi. Tamen. Mi povas vidi; ekzistas sistemo, planado kies celo estas regi per timo". La sistemo ekspluatas tion. "Tio malhomigas nin", li amare konstatas.

Morale, estas malkomforte: "Mi scias ke mi prenis la lokon, ke mi per mia laboro, mia preteco se vi preferas, forpuŝis dungiton, personon subite superfluan. Laborkamaradon". Iun tagon iu dungisto malaperas. Oni ne scias kial li ne plu rajtas labori tie, kien li iris. Ne eblas amikiĝi. Oni iĝas numero. Ĉiu suspektas ĉiun. Kristian provas plu savi sin verkante ege frue en ĉiu mateno, memorante pri sia dekkvarjara filo, kiu vivas aliloke kaj kun kiu li ne havas kontakton. Li pensas pri li kun amo, mense skribas al li: "Vi devas esti fidela al vi mem. Vi devas stari rekta". Li elvokas sian patrinon kiu provis eduki siajn infanojn en malriĉa kvartalo, sed kies menso estis trafita de skizofrenio, kiu perdis kontakton kun la realaĵo.

Unue, li estis suspektata de la aliaj kunlaboristoj, ĉar li estas edukita svedo, pli legis ol ili. Tamen li konscias, ke li estas iom pli bonŝanca ol la aliaj: li havas propran loĝejon, li havas kulturon – li citas Stagnelius kaj Almqvist, famajn svedajn poetojn eĉ se ne eksterlande. Li rakontas, ke en la popolbiblioteko, kiam li estis juna, li pruntepreinis librojn kiuj plu staras sur lia ŝranko: verkoj de Karin Boye, Tomas Tranströmer, Ivar Lo-Johansson, kaj *La Nausée* de Sartre. Malgraŭ la malfacilaĵoj, li plu verkas. Ĉar li substrekas en la lasta frazo de la libro "ke konstantas nur tio ke mi devas serĉi mian propran liberecon".

Do, se vi eltenas sinkopajn frazojn pri mizerabilismo, alkoholo, ekspluatado, psikiatriaj hospitaloj, plaĉos al vi la legado, kaj se vi estas scivolema kaj esploros pri la nomoj cititaj, vi scios multe pri Nobelpremiito, stataroj (kvazaŭ svedaj kamparaj servutuloj). Tia rapide legebla libro, apartenas al la kategorio kiun mi pli bone taksas je la dua legado, ĉar la elektita ŝajna malriĉeco de la stilo kondukas vin poste al malkovro de kaŝita personeco, de interhomaj rilatoj.

Anne Jausions

# Labori por paco en malpaca mondo

La pasintan jaron ombris militoj kaj atencoj. Sirio, Irako, Jemeno, Sud-Sudano, Niĝerio, Centrafrika Respubliko, Mjanmao, Pakistano, Afganio, Ukrainio, Meksiko, Kolombio... en ĉiuj kontinentoj, miloj da homoj mortis perforte, per bomboj kaj pafiloj, en daŭrantaj konfliktoj diversspecaj. Teror-atakoj amase mortigis civitanojn en Ankaro, Garisso, Bejruto, Parizo, Tunizo, San-Bernadino. Pri kelkaj el tiuj tragedioj oni vaste raportis; pri aliaj nur malmulte. Sed pri rapidaj kaj facilaj solvoj oni ne povas paroli, ĉar temas pri fruktoj de longa malpaca historio.

Tiu malpaca historio estas la fono, sur kiu aperis kaj disvolviĝis nia movado por "lingvo neŭtrale homa". Ni ĉiuj konas la alvokojn de Zamenhof, ke ni, "pacaj batalantoj", laboru por starigi "unu grandan rondon familian", en kiu ĉiuj homoj kaj popoloj povus senti sin sekuraj kaj juste traktataj. Sed ni ne forgesu, ke li faris tiujn alvokojn fronte al kruelaĵoj, kiuj hante similas tiujn de la nuna mondo. Jam en la dua Universala Kongreso en Ĝenevo, 1906, li elvokis la eventojn en sia ruslanda patrujo:

"Terura estas la stato de aferoj en la multelingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamo! Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi, en la urbo Bielostok, rigardadis kun doloro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj boniĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj sonĝoj mi ekvidis teruran efektivaĵon: en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj loĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion, ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasis la kraniojn, kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la bestega Bielostoka buĉado; al vi kiel al Esperantistoj mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas."

Kompreneble Zamenhof ne povis antaŭvidi, kiom pli teruraj kaj amasaj estos la suferoj de viktimoj en la unua kaj dua mondmilitoj, kiam pereos i.a. liaj propraj familianoj. Sed li jam komprenis, kiel li diris la postan jaron en la londona Gildhalo, ke "longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero", antaŭ ol "la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj".

Kiel ni esperantistoj kondutu, fronte al tiuj realaĵoj? Evidente ni ne estas imunaj kontraŭ antaŭjuĝoj kaj misperceptoj pri niaj kunhomoj; ĉiu el ni dividas, certagrade, la valorojn kaj vidpunktojn de siaj etno, socia klaso, amaskomunikila medio kaj simile. Iĝante esperantisto, oni ne demetas siajn aliajn identecojn. Tiel eblas, ke esperantistoj tiriĝas al malsamaj flankoj en diversaj konfliktoj, aŭ pli spontane sentas solidarecon kun iuj viktimoj ol kun aliaj. Tiel eblas, ke ankaŭ en Esperanto foje aperas esprimoj de maltoleremo, malrespekto, eĉ malamo.

Lerni Esperanton estas efektive nur unu paŝo sur longa, preskaŭ senfina vojo al homaraneco. La lingvo donas al ni multon: esprimilon, komunikilon, kulturbazon, tradiciaron; unuvorte, komunumon. Sed, por citi Zamenhof denove: "Ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn." Nia komunumo estas lernejo, en kiu la lernantoj estas samtempe la instruistoj, en kiu la studfakoj kovras la tutan vivon de la homaro, en kiu la fina diplomo neniam estas atingita. Esperanto provizas fundamenton, konstrumaterialojn; ni faras la ceteron mem, laŭ niaj povoj.

Tiuj povoj ankoraŭ ne etendiĝas al la ĉesigo de militoj, kiel revis Zamenhof. Ni dividas la timojn kaj la sentojn de la ordinaraj homoj, kiujn trafas la minaco de bomboj kaj kugloj. En niaj diversaj hejmlokoj, ni venas al diversaj starpunktoj pri la politikaj kaj sociaj demandoj, kiuj naskas teroron kaj militon. Sed kiel esperantistoj, ni povas strebi al solidareco, al reciproka kompreno, al kunlaboro kaj kunlernado nelimigitaj de haŭtkoloro, kredo, kulturo. Al la detruado ni povas kontraŭmeti konstruadon; al la klopodoj disigi kaj marĝenigi homojn ni povas respondi per malfermitaj brakoj kaj pordoj.

Kiel fari tion pli efike, pli konsekvence, pli bone – jen grava demando por la 101-a Universala Kongreso en Nitro. Sub la temo "Socia justeco — lingva justeco" ni havos okazon repripensi la laboron de la esperantistoj por pli paca mondo. Ni ja ne estas solaj en tiu laboro; amaso da movadoj, multe pli ol en la tempo de Zamenhof, dividas niajn valorojn kaj niajn celojn, se ne ankoraŭ nian lingvon. Malfermante nian modestan memlernejon al iliaj ideoj kaj atingoj, enplektante ilin en niajn diskutojn kaj planojn, ni samtempe plifirmigos nian pozicion en la tuthomara strebado por paco kaj justeco.

Mi deziras al ĉiuj esperantistoj pacan kaj solidarecan jaron 2016!

Mark Fettes



**Mark Fettes**

# LANDAJ PERANTOJ

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete : fran14@bigpond.net.au

**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1 , BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo : 00-32- (0)71 644916
Rete : cglady@arcadis.be
Bankkonto : 750-6373051-18
IBAN : BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22

**Bosnio-Hercegovino** – Ivica Horvat
Žrtava fašizma 1/IX, BA-71000 Sarajevo, Bosnio-Hercegovino
rete : ivica.h@hs-hkb.ba

**Brazilo** – José Joaquin Lunazzi
R. Manoel Antunes Novo, 668, BR-13084-157
Campinas-SP., Brazilo
rete : lunazzi@esperanto.cc

**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel. : +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX, IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete : ap_esp-sat21@yahoo.co.uk

**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791 (poŝa) : +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF

**Ĉeĥio** –Václav Stibůrek
J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
tel. : +420.737230231, rete : stiburek.v@seznam.cz
IBAN : CZ6620100000002900048738
BIC/SWIFT : FIOBCZPPXXX

**Ĉinio** – BRUNO GUY CLAUDE HENRY
rete : esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto N°6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC : BKCHCNBJ970
BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan Furong Road (M) CHANGSHA - HUNAN -ĈINIO

**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete : barthelemy.maurau@free.fr
Bankkonto : 1733310 N 020
IBAN : FR82 2004 1000 0117 3331 0N02 070
BIC : PSSTFRPPPAR

**Germanio** – Dominik Schramm
Möhringer Straße 43, DE-70199 Stuttgart, GERMANIO
rete : dominik.schramm@gmx.net
senpagaj internaciaj ĝiroj eblas rekte al la konto "SAT" ĉe "La Banque Postale, Paris" :
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC : PSSTFRPPPAR

**Hispanio** – Pedro Maria Sanz Sanz
C/Mar de Fora 13, esc.izqda., 3-B, ES-28400 Collado Villalba, Hispanio
rete : pedrosanzsat@gmail.com
Konto : 0227-0001-85-0200526929 - banko apartenanta al BBVA
IBAN: ES04 0227 0001 8502 0052 6929
BIC: UNOEESM1XXX

**Hungario** – Tóth Zsolt
Agyag u. 10, HU-9400 Sopron, Hungario
Tel : +36-20-5188919 , rete : zstoth75@gmail.com
Bankkonto : 11773377-00000354
IBAN : HU55 1177 3377 0000 0354 0000 0000
BIC : OTPVHUHB

**Italio** – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO) , Italio
rete : carlo.bourlot@gmail.com
Tel. : 011-39.70.477, Poŝtel.: (+39) 327-327 3993
Poŝtkonto : n-ro 43976158
Kodo IBAN : IT88Z0760101000000043976158,
Kodo BIC : BPPIIRRXXX

**Izraelio** – Jeĥoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete : b48705544@013.net

**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete : sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto : 00980-9-37624 SAT-Nihon

**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
Gwanggyo-hosu-Ro 356 No.301 (3F), Suji-Gu
KR-448-130 Yongin-Si, Gyeonggi-do
rete : paze23@gmail.com

**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
Otok Brac, HR-21414 Gorni Humac, Kroatio
Tel : +385.21.647.059, Poŝtel : +385.098.182.79.07
rete : ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Poŝtkonto : 3200129804 Splitska banka
IBAN : HR81 2330 0033 2001 2980 4, BIC : SOGEHR22

**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel : +37068736457, rete : grazopul@yahoo.com
Bankkonto : LT347300010001720030
BIC/SWIFT kodo : HABALT22, Swedbank

**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete : llrespr@libero.it
IBAN : MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG

**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio

**Portugalio** – Manuel Luis Pedrosa Alves
Estrada Principal, 79, Morelinho, PT-2710 Sintra, Portugalio
rete : morelinho_sintra@hotmail.com

**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete : nikolao@orc.ru

**Serbio** – Tereza Kapista
Studentska 39/23, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete : tereza.kapista@ptt.rs

**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete : ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto : Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN : SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC : NDEASESS

**Svisio** – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete : rischneller@gmail.com, Poŝtkonto n-ro 25-158577-1

**Tajvano** – CHO Chaoming
12F2, No. 41 , Bijhong Street, TW-80342 Kaohsiung
rete : cmcho@so-net.net.tw

**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete : classs@bigmir.net, telefone : 380 67 99 470 03

**Usono** – Brandon SOWERS
2341 Jefferson Dr, US-GA 30350 SANDY SPRINGS, Usono
rete : nigrakajrugxa@gmail.com
Konto #631382, ĉe kredit-unuiĝo "Spire".

**Aliaj landoj**
SAT-Sidejo, 67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso) : kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj) : financoj@satesperanto.org
Poŝtkonto : 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC : PSSTFRPPPAR
eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA : satx-s
aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal :
financoj@satesperanto.org

# KOTIZOJ 2016

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 27 € | Japanio | 7000 JPY |
| Aŭstralio | 52 € | Kanado | 81 CAD |
| Aŭstrio | 52 € | Koreio | 33 € |
| Barato | 12 € | Kroatio | 12 € (90 HRK) |
| Belgio | 52 € | Latvio | 12 € |
| Bosnio-Herc. | 10 € | Litovio | 12 € |
| Brazilo | 22 € | Malagasio | 5 € |
| Britio | 45 GBP | Makedonio | 5 € |
| Bulgario | 12 € | Malio | 5 € |
| Ĉeĥio | 20 € | Mongolio | 12 € |
| Ĉinio | 45 CNY | Meksikio | 15 € |
| Danio | 52 € | Nederlando | 52 € |
| Estonio | 12 € | Norvegio | 52 € |
| Finnlando | 52 € | Pollando | 12 € |
| Francio | 52 € | Portugalio | 30 € |
| Germanio | 52 € | Rusio | 12 € |
| Grekio | 5 € | Serbio | 12 € |
| Haitio | 5 € | Slovakio | 12 € |
| Hispanio | 40 € | Slovenio | 12 € |
| Hungario | 12 € | Svedio | 52 € |
| Israelo | 32 € | Svisio | 79 CHF |
| Islando | 33 € | Ukrainio | 12 € |
| Italio | 50 € | Usono | 74 USD |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**


*Sennaciulo*
Oficiala organo de SAT

**Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Poŝtkonto:*
SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1 000 01 01 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Sekretario:* Diana Riŝar
*Kasisto:* Bruno Henry
*Membroj:* Guy Cavalier, Franjo Martin, Pedro Sanz, Dominiko Simeone

**Sennaciulo**
*Redaktoskipaj kunordigantoj:* Vinko Markovo, Pedro Sanz
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale.
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*
SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol,
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 39 €
Autres pays/*aliaj landoj:* peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 20 G 86567


> Por la nemenciitaj landoj la aliĝo al SAT estas 5 € kaj la PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj laŭ la geografia zono de la lando.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo

> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.

> Pagante 75 % de la plena kotizo por la koncerna lando, nemembro povas jaraboni Sennaciulon + ĝian jaran suplementon Sennacieca Revuo.

> La kotizo estas pagenda al: poŝtkonto n-ro 1234-22 K Paris, aŭ al la landa peranto de via regiono.

# DONACINTOJ

**SOLIDARKASO**


HENRY Bruno 3,00 EUR
KESSOUS Michèle 21,00 EUR
GRUPP Gerald 16,00 EUR
KNOEFERL Franz 96,00 EUR
MICKLE Gary 48,00 EUR
FARKAS Laszlo 4,50 EUR
BERNARD Francis 8,00 EUR
VIVANCOS Eduardo 40,00 EUR
GRADUSOV Shirley 11,00 EUR
CAVALIER Guy 18,00 EUR
KESSOUS Djémil 21,00 EUR
EBERSPACHER Kurt 50,00 EUR
XIONG Linping 55,00 CNY
BANDINI Alberto 30,00 EUR
HARJU Antero 48,00 EUR
XIL Nikolas 3,40 EUR
GONZÁLEZ Alfredo 10,00 EUR
MAURO Bartelemio 8,00 EUR
SCHERM Michael 28,00 EUR

**HELPFONDUSO KONGRESO**

TILLEMAN Jehosua 30,00 EUR

# Laste aperis ĉe SAT-EFK




## Novaj aliĝoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| 36051 | ADJE Adjevi | TO - LOME-BE | Togolando |
| 36052 | GOLIC Nikola | HR-43226 VELIKO-TROJSTVO | Kroatio |
| 36053 | STECHER Uwe | AT-1210 VIENO | Aŭstrio |

## Nekrologoj

La 12an de aŭgusto 2015 mortis en Leusden (NL) k-dino Antje Noordewier-Jagtenberg (matr. 32866). Ŝi naskiĝis en 1925 kaj estis SAT-anino de 1984.


***

Komence de 2016 mortis k-do Roger Hardy (matr. 32805) el Poitiers (FR). Li naskiĝis en 1918, SAT-aniĝis en 1981, kaj fariĝis dumviva membro en 2006.

***

La 5an de oktobro 2015 mortis en Londono k-do Jacques Wilfred (matr. 35159).
Li aliĝis al SAT en 1996. Lia lasta kongreso estis la milana, en 2009.


***



Post la forpaso de Lucija Borćić (matr. 35669) lastjare meze de novembro, ankoraŭ alia insulano forlasis nin fine de februaro. Temas pri Dinko Matković (matr. 30981), kiu estis entombigita en sia Vrboska. Eblas vidi fotojn pri la entombigo, kiun enretigis la 24an de februaro lia nevo Mirko Matković: blog.dnevnik.hr/geomir/.

Dinko fermis okulojn antaŭ atingi 91 jarojn ĉar li naskiĝis la 10an de junio 1925. Multaj esperantistoj kun familianoj estis gastigitaj ĉe Dinko dum la jaroj, kaj inter ili ankaŭ mi plurfoje kaj lastjare kun mia filino Flora. Kvankam mi aŭdis pri proverboj kaj amuzaj rakontoj kiujn Dinko skribis, ni konatiĝis nur en Sarajevo dum SAT-kongreso kiu okazis dum la somero 2011. Lastfoje ni estis kune en Madrido en 2013, kaj ni kune vojaĝis inter Madrido kaj Split aviadile. Por Dinko la madrida kongreso estis la lasta. Dinko tamen fine de la jaro 2014 eldonis lastan libron ("Lovište nesklada" - Ĉasado de malakordo), kiun eblas vidi sur la sama retejo blog.dnevnik.hr/geomir/. Lastfoje mi vizitis Dinkon en la maljunulejo kiu troviĝas en Duilovo. Sankta Marija kiun Dinko ofte vokis prenis lin en brakojn kaj li nun povas trankvile ripozi. Al ni li lasis verkojn kaj proverbojn kiujn mi konservos dum la vivo. Dankon Dinko.


Vjeko Markov



La korto (p. 24)



Bohemiaj lumoj (p. 21)


*Cartaphilus*
*Revista de investigación y crítica estética*

ISSN: 1887-5238 n.º 13 | 2015 | pp. 173-204

ANACIONALISMO Y ANARQUISMO EN EL SIGLO XX.
SEGUIDO DE UNA TRADUCCIÓN DEL
*MANIFIESTO DE LOS ANACIONALISTAS* (1931),
DE EUGÈNE LANTI

BERNAT CASTANY PRADO
Universidad de Barcelona

Eugène Lanti en 1933.

Pri sennaciismo en universitata revuo (p. 22)


La Monumento de la fratiĝoj (p. 4)


Sindikatismo tutmonda (p. 14-15)


Venu al Toronto (p. 14)